

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Interlingvistika jubileo
en UAM

La mirinda ARKONES

UEA kaj Togolando

Ĉu SAT revigliĝas?

La unua SKI en Italio

Nova Esperanto-muzeo

Kial esperantistoj ne
aĉetas librojn?

Nova rubriko de E@I

La Sukcena Lando (12)

A.Künzli pri “Esperanto
en Perspektivo”

Novelo de Trevor Steele

Tri grandaj recenzoj



Novembro
2008

№11

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2008. №11 (169)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2009

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 450 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la paĝo 27 de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 650 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2008.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2008, №11 (169).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто. Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 19 октября 2008 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Antaŭ dek jaroj, en oktobro 1998, mi skribis en *La Ondo*:

«...estas preskaŭ nekred-eble, ke en Esperantujo ankoraŭ ne ekzistas honora titolo por persono plej elstare rekomendinta sin, malkiel en la Granda Mondo, kie la gazetaro (ekzemple *Time*) faras la ĉiujaran proklamadon de “la homo de la jaro” tradicia institucio. Multaj



sportaj, kulturaj kaj amatoraj komun-umoj ĉiujare elstarigas inter siaj anoj la plej eminentajn. *La Ondo de Esperanto* decidis ŝtopi la breĉon kaj iniciatis la proklamon de la esperantisto de la jaro. Per tiu honora titolo estos distingata persono, kiu je la koncerna jaro plej multe kontribuis al Esperanto».

La unua laŭreato en 1998 iĝis la skota poeto **William Auld**. Ĉe la elekto la internacia komisiono konsideris la vastan amaskomunikilan eĥon pro lia kandidatigo al la literatura Nobel-premio, la kompletigon de la kolosa tradukprojekto “Tolkien en Esperanto”, kaj liajn prudenton kaj volfirmon en la afero pri *La Manto*.

La aŭstralia juristo **Keppel Enderby**, tiutempe prezidanto de UEA kaj de Esperanta Jura Asocio, estis proklamita la Esperantisto de la jaro 1999 pro fortikigo de Esperantujo kaj progresigo de la eksteraj rilatoj de UEA.

Sekvajare estis kunelektitaj tri personoj: **Hans Bakker** pro la sukcesa agado por Esperanto en Afriko, **Mauro La Torre** pro la projekto *Interkulturo*, kaj **Jouko Lindstedt** pro la prizorgo de BJA-listo, okazigo de seminario pri la 20-jariĝo de la Manifesto de Rauma kaj pro la *Hejma vortaro*.

Post eta modifo de la Regularo, kiu komplikis (sed ne malebligis) kunelekton de kelkaj personoj, kiel la esperantisto de la jaro 2001 estis elektita **Osmo Buller**, kiu per sia demisio en 2001 finis la rezultoriĉan dejorperiodon kiel Ĝenerala Direktoro de UEA.

Michel Duc Goninaz estis elektita la Esperantisto de la Jaro 2002 pro la *Nova Plena Ilustrita Vortaro*, kies reviziadon li gvidis.

Dafydd ap Fergus, kimra ĵurnalisto laboranta en Bruselo, iĝis laŭreato en 2003 pro la aktiva informa laboro en la Brusela Komunikad-Centro.

Oprof. Dr. sc. cyb. habil. **Helmar Frank**, prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj, estis proklamita la Esperantisto de la Jaro 2004 pro la sukcesa kunordigo de la agadoj de AIS kaj de ties Universitataj Sesioj.

La prezidanto de la Litova Esperanto-Asocio **Povilas Jegorovas** laŭreatiĝis en 2005 pro la sukcesa realigo de la 90a Universala Kongreso de Esperanto kaj de la 4a Nitobe-Simpozio en Vilno, pro la modela ekstera agado, kaj pro la eldonado de gravaj libroj pri Esperanto en la litova lingvo.

Lin sekvis en 2006 **Bertilo Wennergren**, distingita pro sia *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*.

Pasint-jare **Peter Zilvar** estis elektita la Esperantisto de la Jaro pro sia diversflanka agado por kaj per Esperanto en Herzberg — la Esperanto-urbo.

La aventuro daŭras, kaj post du monatoj ni ekscios la nomon de la Esperantisto de la Jaro 2008.

AlKo

Sur la kovrilpaĝo estas aŭtuna foto de Olga Ŝipovalenko (Kaliningrado).

Interlingvistika jubileo en Poznań

La septembra sesio de la Interlingvistikaj Studoj en la universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań (Pollando) estis escepta, ja kompletigis la unuaj dek jaroj de la Studoj.

Parto de la tria grupo plenumis sian finan ekzamenon post trijara studado prezentante sian diplomlaboraĵon. Gratulojn al Marc Bavant (“La viva genro preter akordo. Interagoj de semantiko kun sintaksa rolmarkado”, Francio); Kirilo Brosch (“Vortfarado el la vidpunktoj de la hindeŭropista lingvoscienco kaj de esperantologio”, Germanio); Anne Jausions (“La plej oftaj malfacilaĵoj de franclingvaj Esperanto-parolantoj”, Francio) kaj Horst Vogt (“Komunikad-problemoj en la institucioj kaj en la membroŝtatoj de Eŭropa Unio — ĉu teorie kaj politike solveblaj?”, Germanio).

Samtempe ekzameniĝis kaj ricevis instruistan diplomon de ILEI (kadre de la unujara komuna kurso de UAM kaj ILEI, organizita la unuan fojon en la studjaro 2007/08) 3 aliaj partoprenantoj: Juratė Bartaškiėnė (“Utiligo de poemoj, rimajoj kaj kantoj en la lingvoinstruado”, Litovio); Witold Czerwiński (“Pedagogia vortareto Esperanta-pola”, Pollando) kaj Edit Slezáknė Tar (“Instruado de akuzativo je diversaj niveloj”, Hungario).

Malgranda, sed entuziasma nova grupo komencis siajn studojn 13–17 sep. Alvenis po du partoprenantoj el Brazilo, Irano, Kroatio kaj Usono, po unu el Francio, Grekio, Koreio kaj Ukrainio. Du afrikanoj, bedaŭrinde, ne ricevis polan vizon — ili nur virtuale povas sekvi la unuan semestron. La ĉeestantoj aŭskultis kursojn pri ĝenerala kaj Esperanta fonetiko de John Wells (kun interesaj ekzemploj), pri Esperanta kulturo de Aleksandr Melnikov (kiu ĉerpis ankaŭ el sia nova libro pri vortludoj) kaj Zbigniew Galor, pri la unua periodo de Esperanta literaturo de Lidia Ligęza kaj Tomasz Chmielik, pri komunikado de Ilona Koutny (kie la partoprenantoj nature povis sperti la diferencojn kaj similecojn en la metakomunikado).

Post la sesio kolektiĝis pli ol 80 homoj en la moderna konferencejo de UAM por la du-taga (18–19 sep) simpozio *Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko*. Alvenis grandparto de la kursgvidantoj, malnovaj kaj novaj studentoj de la Studoj, krome specialistoj kaj interlingvistoj pri interlingvistiko

el 22 landoj (de Germanio tra Ruslando ĝis Brazilo kaj Irano) por kune festi la dek-jariĝon de la Studoj.

La riĉa programo de la simpozio komenciĝis per malferma bloko, kie gvidantoj de UAM (vicrektoro de UAM Zbigniew Pilarczyk, vicdekano de la Novfilologia Fakultato Jerzy Kaliszan kaj vicdirektoro de la Lingvistika Instituto Jan Wawrzyniak) esprimis sian aprecon pro la 10-jara ekzisto de la Interlingvistikaj Studoj kaj bondeziris por la simpozio. En tiu kadro okazis la konciza anglalingva prelego de John Wells (kun Esperanta prezentaĵo), la pollingva prelego de Jerzy Bałcerowski, eksdirektoro de la Lingvistika Instituto pri interlingvistiko kaj lingvistiko (kun Esperanta disdonaĵo). Fine Ilona Koutny, iniciatinto kaj gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj prezentis datumojn el la 10 jaroj de la Studoj (kun pola prezentaĵo).



Ilona Koutny en la Simpozio
(Fotis Ziko van Dijk)

La faka parto de la simpozio okazis en sep sinsekvaj sekcioj, inter kiuj la unuaj tri traktis lingvistikajn aspektojn ĵaŭde, vendrede okazis prelegoj en du kulturaj sekcioj antaŭtagmeze, movado kaj metodiko estis traktataj posttagmeze. Entute 32 prelegojn ni povis aŭskulti (de prelegantoj el 15 landoj) kaj mallonge diskuti pri la starigitaj problemoj. La programo realiĝis laŭplane.

La lingvistikaj prelegoj prezentis vastan gamon da temoj: frazmelodion en Esperanto (John Wells), elekton, klasifikon kaj kombinadon de morfemoj (Iván Bujdosó, Kiril Brosch, Ryszard Rokicki), vortkategoriojn (Blazio Wacha), problemojn de genroj (Marc Bavant) kaj de personpronomo sistemo (Michael Farris). Semantiko (Michel

Duc Goninaz) kaj frazeologio (Sabine Fiedler) same aperis en la programo. Detlev Blanke klarigis, kiel informi en lingvistikaj medioj pri interlingvistiko, Brian Moon raportis pri Esperanto kaj multlingvismo. Vera Barandovská spuris virinojn aktivajn en lingvokreado. La prelego de Aleksandr Melnikov traktis lingvokulturologian aspekton.

La kulturaj sekcioj entenis prelegon pri la periodigo de Esperanto-literaturo de Tomasz Chmielik, prezenton de virina poezio far Lidia Ligęza, glosaron de Piĉ far Josef Dörr. Alicja Sakaguchi traktis realaĵojn el traduka vidpunkto, Nina Daniljuk komparis la vortsimbolojn de la ukraina folkloro kun la Esperantaj. La temaron vastigis prezento de la 50-jara historio de la Pola Radio far Barbara Pietrzak, la rolo de Esperanto en muzeoj de Teresa Nemere. Zbigniew Kornicki meditis pri la esenco kaj estonteco de Esperanto-kulturo. Ni povis aŭskulti problemojn de botanika terminaro de Alain Delmotte kaj la komunikadproblemojn en EU far Horst Vogt.

En la sekcio pri movado aperis temoj kiel informi eksterulojn pri Esperanto de Jukka Pietiläinen kaj entute informi sen mitoj dank'al Ziko van Dijk. Peter Baláž informis nin pri la abundaj projektoj de E@I kaj Zbigniew Galor skizis sociologiajn esplorojn pri la Esperanto-movado. Aleksander Korĵenkov emfazis la aktualecon de zamenhofologio.

La lasta sekcio pri metodiko same vigligis la partoprenantojn per la prezento de *Lingvolanĉilo* far Angela Teller, la Komuna Eŭropa Referenckadro far Katalin Kovács. La propedeŭtikan valoron de Esperanto analizis Małgorzata Nitkowska kaj la tipajn erarojn de francoj en Esperanto Anne Jausions.

En la fermo okazis disdono de atestiloj por la diplomigintoj de la Interlingvistikaj Studoj kaj por tiuj, kiuj finis la unujaran instruistan kurson realigatan en UAM kunlabore kun ILEI.

Ĵaŭde vespere ĉiuj partoprenantoj kunvenis por la bele aranĝita bankedo. La ĉeestanta dekanino de la Novfilologia fakultato povis sperti aŭtentan Esperantan etoson kaj interparoli kun kelkaj partoprenantoj. Vendrede vespere la semajnfina kultura aranĝo ARKONES (vd pĝ. 4) bonvenigis la konferencanojn per diskutrondo, prezento de la irana kulturo kaj multe da muziko...

Ilona Koutny



La mirinda ARKONES

Iam eta renkontiĝo de kelkaj dekoj da artemaj kaj lingvemaj pollandaj (eks)studentoj, **Artaj Konfrontoj** en **Esperanto**, iom post iom fariĝis la plej grava inter la tradiciaj esperantistaj renkontiĝoj en la Orienta Eŭropo.

La altnivela kultura programo logas multajn partoprenantojn, kiuj venas ne por studi la lingvon sed por intelekta riĉiĝi per ĝi kaj por ĝui la Esperantan arton, kaj tia publiko siavice altiras tiujn, kiuj volas lanĉi novajn projektojn aŭ anonci la rezultojn de la projektoj lanĉitaj.

La 24a ARKONES, kiun Poznań akceptis 19–21 sep 2008, konfirmiĝis kiel projekto-lanĉa renkontiĝo. Du novaj diskaj estis lanĉitaj: *Eksplozivas vian domon* de la skandinavia bando *La Perdita Generacio* kaj *Hej!* de la argentina kanzonisto Alejandro Cossavella. Estis prezentitaj multaj aliaj projektoj — eldonaj, edukaj, teatraj, retaj, filmaj kaj turismaj. Inter ili la iniciato de la socikultura revuo *Spegulo*, decidinta distingi tiujn, “kiuj per diversaj klopodoj kaj honesta agado rimarkinde progresigas la internacian lingvon en la Centra kaj Orienta Eŭropo, kiuj en konkordo malbaras vojon al novaj celoj kaj kun estimo kaj respekto servas al ĉiuj Esperantlingvanoj”.

La unuajn statuetojn de *Spegulo* ricevis la animanto de ARKONESoj Paweł Janowczyk, la eldonanto de *La Ondo* Halina Gorecka, la admirinda organizanto Povilas Jegorovas, la kroata aŭtoro kaj redaktoro Josip Pleadin, kaj — ve, posteume — Tadeusz Chrobak, kiun *Spegulo* nomis “nia spirita gvidanto”.

La redakcio de *Spegulo* intencas aljuĝi siajn statuetojn ĉiujare en ARKONES, same kiel ĉi tion faras Marian Zdankowski, la redaktoro de la revuo *FREŜO*, kiu ankaŭ ĉi-foje anoncis la rezulton de la Tutpollanda Esperanta Plebiscito kaj solene disdonis diplomojn al la ĉeestintaj laŭreatoj.

La programo enhavis kvindek da prelegoj, koncertoj, prezentoj, spektakloj, laborgrupoj, diskutoj, konkursoj kaj prelegoj. Ja ARKONES komenciĝis tuj post la fino de la Interlingvistika Simpozio en la loka universitato kun multaj eminentaj interlingvistoj, kiuj plejparte restis por prelegi en la semajnfina ARKONES.

Tamen mi ne intencas listigi ĉiujn programerojn (vidu rete: www.arkones.org), ja la plena listo okupus la tutan paĝon, kaj mencio de nur kelkaj nomoj eble aspektus ofenda al la nemenciitoj. Krome, mi mem malmulton partoprenis, kvankam mi ja kontribuis per du prelegoj kaj prezentado de niaj libronovaĵoj kaj de *La Ondo*. La ceteran tempon mi pasigis, interparolante pri gravaj aferoj kun kunlaborantoj kaj kun aŭtoroj, akceptante kotizojn (pli ol kvardek), respondante demandojn de legantoj, bierumante kaj babilante kun amikoj, inter kiuj multajn mi vidas unu fojon en la jaro — nur fine de septembro en ARKONES.

Mi revenos ankaŭ post unu jaro, kaj mi senhezite rekomendas veni al Poznań al ĉiuj, kiuj deziras ĝui niajn artajn atingojn, aŭskulti interesajn prelegojn, esti inter multaj virtuozaĵoj esperanto-parolantoj sen movadaj jarkunvenoj kaj sen lingvokursoj, en altspirita internacia etoso de ARKONES.

AIKo

KKS denove kun asistanto

Dum pli ol kvin jaroj en la Kongresa Fako de la Centra Oficejo de UEA laboris nur unu dungito, la Konstanta Kongresa Sekretario (KKS). Tiu nenormala situacio ĉesos la 1an de decembro 2008, kiam KKS denove ekdisponos pri asistanto. Per ĵusa decido de la Ĝenerala Direktoro eklaboros tiam kiel nova oficisto de UEA la 24-jara Tobiasz Kaźmierski el Pollando.

Tobiasz Kaźmierski naskiĝis kaj kreskis en Poznań. Li studis tie sociologion en la universitato Adam Mickiewicz kaj spertiĝis ankaŭ pri merkato kaj vendado. Spertojn por sia nova tasko ĉe UEA li kolektis i.a. kiel kunorganizanto de la fama Esperanto-aranĝo ARKONES kaj kiel respondeculo pri la vespera programo de la 61a IJK en Zakopane en 2005.

En 2003 li fondis kun kelkaj amikoj la junularan klubon *E-Senco*, kiu en 2007 transformiĝis en kulturano-socian asocion kun Kaźmierski kiel unu el la vicprezidantoj. Li partoprenis ankaŭ en la reaktivigo de Pola Esperanto-Junularo, kies vicprezidanto li estis, kaj en la Ekonomia Forumo de Centra kaj Orienta Eŭropo en la pola urbo Krynica en 2007 kaj 2008, kie li helpis prizorgi informstandon pri Esperanto.

GK UEA

La herooj de la jaro 2008

En ARKONES okazis enmanigo de belaj diplomoj por gajnintoj en Tutpollanda Esperanta Plebiscito 2008.

En la kategorio “Amiko de Esperanto” gajnis: Jarosław Czubiński (eksa pollanda konsulo en Kaliningrado, Ruslando) kaj Heinrich Tänges (ŝoforo de Malborka Esperanto-Klubo).

En la kategorio “Esperantisto de la Jaro” gajnis: Jadwiga Wasiuk kaj Paweł Janowczyk.

En la kategorio “Loka Esperanto-aktivulo” gajnis: Antoni Dorosz, Józef Golec, Robert Kamiński kaj Jarosław Parzyszek.

En la kategorio “Debuto de la Jaro” gajnis: Agnieszka Rzetelska.

En la kategorio “La tuta Esperanto-agado” gajnis: Ewa Bondar kaj Jadwiga Greger.

En la plebiscito partoprenis pli ol ducent polaj geesperantistoj, kiuj ĝenerale voĉdonis rete. Multaj proponoj enhavis interesajn argumentojn por kandidato(in)o.

Marian Zdankowski

Mesaĝo de la prezidanto de UEA al funkciuloj de Unuiĝo Togolanda por Esperanto

Mi skribas al la estraranoj kaj la komitatanoj de Unuiĝo Togolanda por Esperanto lige kun la fakto, ke Koffi Gbeglo — kiu interalie reprezentas UTE ĉe Universala Esperanto-Asocio en la rolo de komitatano A — lastatempe afiŝis iujn numerojn de sia retbulteno *Konsciu*. El ili aparte n-ro 39 inkluzivas plurajn teksterojn, kiuj ekstreme severe malobservas la normojn de Universala Esperanto-Asocio. Certe vi komprenos sen detalaj klarigoj, kial tiuj teksteroj estas neakcepteblaj. Temas ne nur pri lezo de la principo distingi en publika komunikado inter publikaj kaj privataj temoj, sed pri malobservado de tute bazaj principoj de la deco — tia malobservado, kiun la juro rigardas kiel vortan agresadon. Pro tio, ke Koffi Gbeglo uzis iujn esprimojn severe trans la limoj de la interkultura konduto, nun ĉiuj estraranoj de UEA unuanime kaj insiste petis min skribi al vi.

Post similaj antaŭaj skribaĵoj de Koffi Gbeglo, de multaj flankoj — ankaŭ de liaj (laŭ lia propra prezento) amikoj — estis klopodoj atentigi lin pri la normoj de internaciaj konversacioj kaj pri la neceso observi ilin. Bedaŭrinde tiuj klopodoj ne havis videblan efikon. Post multaj fortostreĉoj mi konvinkigis, ke ne plu eblas esperi, ke la persono mem ŝanĝos sian konduton. Cetere, sendepende de estontaj ŝanĝoj, la teksteroj jam aperintaj en *Konsciu* estas tiaj, ke UEA ne plu povos labori kun li.

Temas pri afero, kiu ne nur nin en UEA koncernas, sed devus ankaŭ koncerni vin en Unuiĝo Togolanda por Esperanto. Vi certe vidas, ke persono kun tia kompreno pri la ebloj kaj mal ebloj en la komunikado ne povas serioze reprezenti la interesojn de via Unuiĝo en la forumoj de UEA. Pro tio mi skribas al vi por klarigi, ke por ke la inter-organiza komunikado inter UTE kaj UEA plue funkcii, necesas paŝoj de la flanko de UTE rilate la okazintaĵojn. Minimume, UTE formale sin distancigu de la uzo de tiaj esprimoj fare de la komitatano A, kiu reprezentas la Unuiĝon antaŭ nia Asocio. Preter tio, se UTE rekonsideros lian rolon kiel komitatano A reprezentanta UTE en la komitato de UEA, tio eĉ pli pozitive efikos sur la rilatojn inter la du organizaĵoj.

Probal Dasgupta
prezidanto de UEA



Por egalrajta komunikado

Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj Dana Esperanto-Asocio aranĝis 21 sep lingvofestivalon en kunlaboro kun la Gepatralingva Asocio. La prezidanto de DEA dum sia malferma saluto akcentis la starpunkton de UEA pri lingvaj rajtoj kaj pri Esperanto kiel simbolo de paco kaj demokratia kunvivado pere de egalrajta komunikado.

Honoraj gastoj estis la prezidanto de EEU Séan Ó Riain kiu emfazis la gravecon de subteno al gepatraj lingvoj pere de siaj propraj spertoj, la membro de la dana parlamento Mogens Jensen kiu elokvente subtenis plurlingvecon, kaj la ambasadoro de Indonezio Abdul Rahman Saleh kiu subtenis la aranĝon kaj disponigis ĉarman dancistinon kiu amuzis nin per danco de la insulo Javo (*vidu la supran foton*).

Sekvis prezentado de 18 lingvoj, inkluzive de Esperanto, dum en granda salono belaspektaj budoj prezentis la lingvojn pere de libroj kaj aliaj informiloj. La muzika parto konsistis el koncertoj de latvia muzikgrupo, *Hotel Desperado* kaj fine de populara dana grupo *Middle East Peace Orchestra*.

Ileana Schröder

En balkana PEN-konferenco

Per la partopreno de Ljubomir Trifončovski, sekretario de Esperanta PEN-Centro, la esperanta literaturo estis reprezentita en la Balkana PEN-konferenco, okazinta 7–10 okt 2008 en la palaco de la rumana reĝino en Balĉik (Bulgario). Kvindek da verkistoj el Bulgario, Cipro, Grekio, Makedonio, Rumanio kaj Turkio diskutis pri la temo “Nacionalismo en la globala mondo kaj la balkanaj verkistoj”.

HeKo

Pri Esperanto en EP

24 sep 2008 en Bruselo Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) disdonis al ĉiuj membroj de la Eŭropa Parlamento kopion de la anonco pri Esperanto.

Ĝi aperis en la franca ĵurnalo *Le Monde* 9 sep 2008 laŭ la mendo de honora membro de EEU Etsuo Miyoshi. Ĝi enhavis por la parlamentanoj interesajn informojn kiel la bildon de la forpasinta vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento, profesoro Geremek kaj informojn pri liaj klopodoj por lingve pli justa Eŭropo, samkiel bildojn kaj informojn pri la du parlamentanoj kiuj subtenas Esperanton: Małgorzata Handzlik el Pollando kaj Ljudmila Novak el Slovenio.

La antaŭan tagon en la ĉefa koridoro de la parlamentejo estis malfermita ekspozicio pri profesoro Geremek kiun la EEU-anoj rigardis post farita laboro, konstatinte ke la momento por disdoni la informojn kun la ĉefa titolo enhavanta ideojn de profesoro Geremek estis tre konvena: unu tagon post la malfermiĝo de la ekspozicio kaj du tagojn antaŭ la Eŭropa tago de lingvoj.

Maja Tišljar

(Laŭ *Eŭropa Bulteno*)

Zamenhof-festo ĉe Unesko

Iniciate de la pollanda delegitaro ĉe Unesko, subtenata de la litovia delegitaro, kaj en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio, 15 dec 2008 okazos en la sidejo de Unesko en Parizo solenaĵo por celebri la naskiĝon de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Samtempe ĝi estos bela enkonduko al la jaro 2009a, la 150a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

Dum la festo estos oficialaj salutoj de la ambasadoroj kaj de reprezentantoj de Unesko. Sekvos poste paroladoj, filmeto pri Esperanto kaj bufedo. La ĉefaj paroladoj estos tiuj de la franca lingvistino Henriette Walter kaj de la nepo de Zamenhof, Louis Zaleski-Zamenhof.

La tuto en solena etoso okazos de 17h30 ĝis 20h30 en la sidejo de Unesko en Parizo.

Ĉiuj esperantistoj estas varme invitataj partopreni. Por eniri la sidejon de Unesko vi devos esti en listo antaŭlive-rotita al Unesko. Por esti en tiu listo, se vi pretas partopreni, bonvolu tuj sendi al la ret-adreso zamenhof.che.unesco@co.uea.org vian personan nomon, familian nomon, poŝtan adreson kaj ret-adreson.

La organiza komitato

En la Eŭropa Socia Forumo

La Esperanto-Asocioj de Danio kaj Svedio kune kun Eŭropa Esperanto-Unio kunaranĝis partoprenon dum la Eŭropa Socia Forumo, kiu okazis 17–21 sep en Malmö. Dum ĉiuj tagoj funkciis Esperanto-budo, kie la deĵorantoj vigle diskutis kun la vizitantoj kaj disdonis centojn da flugfolioj en pluraj eŭropaj lingvoj, afable senditaj de la diversaj Esperanto-Asocioj de EEU, al kiuj ni estas tre dankemaj.

20 sep matene la prezidanto de EEU Séan Ó Riain prelegis pri “Egalrajta interkultura dialogo en tutmondiĝanta mondo”, kaj Lars Forsmann enkondukis la partoprenantojn al rekta metodo de lernado. Sekvis vigla diskuto, kaj junaj lernantoj de filmlernejo filmis la seancon.

Posttagmeze okazis manifestacio kun partopreno de pli ol 15 mil personoj, kie ankaŭ la Esperanto-movado estis reprezentita (*vidu la suban foton*).

Ileana Schröder



Ĉu kongresi en Afriko?..

La Konsulo de la Esperanta Civito, Giorgio Silfer, proponas organizi African Kongreson de Esperanto okaze de la ora jubileo de la sendependiĝo de multaj afrikaj landoj, “por montri ke la esperanto-kulturo partoprenas la procezon de memdeterminado de la popoloj”.

Laŭ la Konsulo la plej oportuna dato estus la jarfino 2010, kaj la plej taŭga urbo estus Lomeo, pro la vasta esperantlingva komunumo, loĝanta inter Eburio kaj Niĝerio; kvankam klimato kaj turismo la Tanganika lago (do Burundio) estus eble pli interesa.

“La decidoj dependos de la opinio de la afrikaj Esperantianoj, unuavice de la paktintaj establoj kaj de la vickonsulo pri la tria mondo, Chamberline Ngué-fack”, — precizigas la Konsulo. La tri paktintaj establoj en Afriko estas Tietti-Instituto en Lomeo, la landa asocio de Niĝerio kaj SIPU en Burundio.

HeKo

Ĉu SAT revigliĝas

Sennacieca Asocio Tutmonda kongresis en Kazanlako (Bulgario) de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 2008 en etoso kamaradeca kaj vigla.

Ĉi-jare multis junuloj en la kongreso kun relative nealta nombro (60) da kongresanoj, tamen ege partoprenemaj al la laborkunsidoj kaj sociaj forumoj. La revigliĝo de SAT — konstatita dum last-jara Pariza kongreso — konfirmiĝis: projektoj realiĝis, nove lanĉitaj ideoj maturiĝis dum la jaro kaj multegaj pliaj naskiĝis. Post krizaj jaroj, SAT resaniĝas kaj denove rigardas estonten, en kunlaborema transgeneracia atmosfero.

Inaŭgurita en Parizo nova formulo de SAT-Kongreso proponas t.n. Sociajn Forumojn, kies formo estas kiel eble plej interaga: debat-enkondukanto skize prezentas temon dum horkvarono kaj poste oni enprofundiĝas en la temo per pliaj intervenoj de ĉeestantoj, kiuj alportas kompletigon, malkonsenton, novajn ideojn aŭ demandojn. Tiel, dum unu horo, la kongresantoj kleriĝas en kamaradeca kaj egaleca etoso: neniu havas la veran respondon kaj ĉiu strebas al memstara pensado.

Dum ĉi-jaraj Sociaj Forumoj, ni interparolis pri monda malsato, sindikata agado kaj helpo al enmigrintoj, naturmedia kaj sociala tutmonda krizo, sociopolitika situacio en postsocialismaj landoj, ekspluatado en kapitalisma paradizo.

Dum la laborkunsidoj, eblis konstati kiel SATanoj laboris dum unu jaro, kaj kiel ili projektas disvolvi sian agadon dum la venonta.

SAT estas membro de tutmonda kontraŭ-grapolbomba koalicio CMC, kaj dum la tuta jaro ĝi partoprenis en ĝiaj agoj. Inter la realigitaĵoj, nepre menciindas la laboro de nove (re)starigita Eldona Fako Kooperativa de SAT. SAT-EFK nun preparadas eldonon de tri pliaj verkoj kaj dum la Kongreso naskiĝis kvin pliaj projektoj.

Pri projektoj: ili celas disvolvigi de SAT mem kaj de ties agado. Unue, por ampleksigi la internan demokration kaj kontaktojn kun kamaradoj sen retaliro, disvolviĝas reto de SAT-rondoj, t.e. grupo de samregionaj membroj kiuj kuniĝas por organizi lokajn kontaktojn kun aliaj laboristaj organizoj, pridiskuti internajn sociajn aferojn aŭ verki informajn artikolojn por *Sennaciulo*. Plu kun la celo disvolvi internan demokration, estis decidita organizado dum kongresoj

de klerigaj sesioj pri retejmastrumado kaj sociaj financoj, por ebligi al la membraro esti memstara en sia ĉiutaga agado en kaj ekster SAT.

Kompletige al tiu disvolvo de la interna vivo, la organo de SAT *Sennaciulo*, post lastjara prov-periodo, aperos dumonate por ebligi pli ampleksajn tem-dosierojn, pli bone prilaboritan aspekton kaj finfine akuratecon en la aperitmo.

Do, entute, mi povis konstati, ke SAT ankoraŭ ne mortis, ke projektoj disfloriĝas kaj ke la labor-etoso estas agraba: homoj diversaĝaj debatas, fojfoje malkonsentas, sed finfine kunlaboras kaj kune progresas, lernante de sia najbaro.

Kiel decas al kleriga asocio, kia estas SAT, la kultura programo zorge flegita de la OKK estis riĉa. Diversaj tre interesaj prelegoj proponis historian superrigardon pri Kazanlako kaj Bulgario el diversaj vidpunktoj. Kompletige kaj en tuja rilato kun la prelegoj, estis diversaj ekskursoj en la Kazanlaka regiono.

Fine de tiel plene okupitaj tagoj, artistoj flegis la kongresanojn, per prezentado ĉu de diversaj muzikpecoj el la tuta mondo brile aranĝitaj, interpretitaj kaj eĉ komponitaj (fare de ensemblo *Libriko*, kiu konsistas el juna esperantista gefratara 10jara ĝis 20jara el Beogrado, per korno, akordiono, violono, violonĉelo kaj kanto), ĉu de lokaj folkloraj dancoj belege montritaj.

La oficialan malfermon de la kongreso ĉeestis vic-urbestro de Kazanlako, kiu varme bonvenigis la kongresanojn, laŭdante la laboron de esperantistoj. Dum la kongreso, estis invititaj de kamarado komunisto du respondeculinoj de la loka komunisto partio.

Sed mi tamen havas impreson ke la membroj ne plene konscias pri la graveco de la laboro plenumbla far SAT. Kvazaŭ Esperanto kaj SAT vivus en paralela mondo. Kiel povas esti ke SATanoj ne plene konscias pri la unika rolo de SAT? Dum la kongreso, informo-interŝanĝoj ebligis al multaj el ni kongresanoj ampleksigi sian penskampojn. Tio estas konkreta efiko. Kaj tiu utilego reeĥiĝas en *Sennaciulo* per diverstemaj artikoloj. Kiam do SATanoj konsideros sian asocion ne plu nura ludilo por ferioj (kvankam multe pli da SATanoj ĉeestis UK-on en Roterdamo ol la Kazanlakan SAT-Kongreson...), sed kiel konkretan mondo-plibonigilon? SAT tion ja meritas!

Robin Beto

Jubilea elsendo el Vatikano

(*Informatale*) 5 okt 2008 Radio Vatikana disaŭdigis sian 4000-an elsendon en Esperanto. La unua elsendo okazis en la nokto inter la 17a kaj la 18a de aprilo 1976 (inter la Sankta Sabato kaj la Paska Dimanĉo), en la kadro de la programo *Kun ni en la nokto*. Kiel raportite en *Espero Katolika*, 1976, №7:

tiu unua elsendo konsistis nur el kelkaj vortoj de meditado, legitaj de s-ino Elizabeta Rzemny-Puracchio, hungarino loĝanta en Romo. Laŭ la planoj ĝi estus devinta esti pli ampleksa kaj surondiĝi duonhoron pli frue, sed pro la escepta longa daŭro de la paskaj ceremonioj oni devis lastmomente limigi la daŭron kaj prokrasti la elsendon.

Ekde 25 apr 1976, kontraŭe, estis disaŭdigata kvinminuta programo, registrita de la menciita sinjorino kaj de patro Giacinto Jacobitti.

Sekvis pli ampleksaj kaj regulaj elsendoj ekde 2 jan 1977 ĝis nun.

Antonio De Salvo

309 koreaj studentoj eklernis

309 gestudentoj de la Korea Fremdlingva Universitato, Universitato Dankook kaj Universitato Wonkwang aliĝis al la kursoj de Esperanto en la dua semestro 2008. La kurso komenciĝis de la unua semajno de septembro kaj finiĝos en la tria semajno de decembro.

Post la kurso, la studentoj ricevos du poentojn oficiale de la respektivaj universitatoj kaj ateston de la Korea Esperanto-Asocio.

Tiuj, kiuj volus korespondi kun la kursanoj aŭ volus sendi mesaĝon al ili, skribu al Lee Jung-kee (esperanto@saluton.net aŭ www.esperanto.co.kr). Mi mem transdonos la mesaĝojn al la nove bakotaj esperantistoj.

Lee Jung-kee

... kaj 100 ĉinaj

Depost mia reveno el Britio la pasintan oktobron, mi sukcesis fari Esperanton elektelebla studobjekto en la universitato Nanchang (Ĉinio). En la du okazintaj kursoj en la universitato ĉeestis 290 gestudentoj el diversaj fakoj.

7 okt komenciĝis nova kurso. Cent studentoj aliĝis. Post la 32-hora lernado ili gajnos du poentojn. La studentoj venas el diversaj fakoj.

Xiaofeng Gong



Publika vespera programo en Rimini

IKUE: La kvaran fojon en Rimini

De 30 aŭg ĝis 6 sep Rimini gastigis la 61an Kongreson de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). La temo de la Kongreso estis “La parolo de Dio — Nia politiko: paroli kaj preĝi” (Paŭlo la 6a).

La kongreso allogis esperantistojn el Aŭstrio, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio, Germanio, Italio, Kamerunio, Kongo, Kroatio, Litovio, Madagaskaro kaj Nederlando. Rimini jam la kvaran fojon gastigis la kongreson. Ĉi-jara gastigado ligiĝis kun la jubileo de multmerita Honora Prezidanto de IKUE, pastro Duilio Magnani, kaj kun la centjariĝo de Esperanto en Rimini.

Oni povas diri, ke la kongreso vivis kun la urbo. Jam la unuan vesperon, la kongresanoj ĉeestis publikan programon honore al la 26a datreveno de la vizito de la papo Johano Paŭlo la 2a al Rimini. La ĉeestantojn salutis la prezidanto de IKUE Miloslav Šváček, kaj dum la programo surscenejiĝis infana E-grupo el Ĉeĥio. Per sia ĉefcelebrado de la meso kaj predikado en Esperanto kongresanojn honoris la loka episkopo Francisko Lambiasi. Li ankaŭ ĉeestis la inaŭguron de la kongreso kaj de la ekspozicio rilata al 100-jariĝo de Esperanto en Rimini kaj pri la bonfara agado de la loka E-grupo.

Oni povis aŭdi kelkajn prelegojn. La vivon de Papo Paŭlo la 6a en la kunteksto de la historio per aparta filmo prezentis Carlo Sarandrea. Temas pri la papo al kiu ankaŭ la esperantistoj ŝuldas multon. Mons. Gabriel Anda prelegis pri la disvastigo de la Parolo de Dio en Kamerunio.

Dank’ al la permeso de Gerrit Berveiling la kongresanoj aŭskultis interesan

prelegon pri lia tradukado de la Bibliaj libroj, kiun li prezentis dum la ĉi-jara UK, okaze de IKUE/KELI kunsido. Marija Belošević prelegis pri “La Parolo de Dio kaj sanktuloj”.

La unuan fojon dum IKUE-kongreso oni aplikis ankaŭ laborgrupojn, kiuj havis taskon tuŝi la ĉefan temon de la kongreso el la vidpunkto de misio de la eklezio — evangelizado kaj rilato de la Parolo de Dio kaj la komunikiloj.

La Ĝenerala kunsido de IKUE diskutis la agadon dum 2007. Rilate la estontan agadon oni decidis akcepti la proponon venontjare kongresi en Vroclavo kaj por la jaro 2010 oni serioze pensas pri Parizo. Rilate estontan agadon oni tuŝis plurajn demandojn ligitajn kun *Espero Katolika*, CO de IKUE kaj aliaj iniciatoj sojle de la dua jarcento de IKUE.

Ĉefa celo de la tuttaga pilgrimado estis la baziliko-sanktejo de sankta Jozefo el Kopertino (1603–1663) en Osimo. En la kriptoj apud la tombo de tiu sanktulo okazis meso en Esperanto post kiu la kongresanoj vizitis la loĝoĉambrojn de la Sanktulo.

Krom la unua vespero jam priskibita, ankaŭ aliaj vesperaj programoj abundis: de tradiciaj kantistoj ĝis la koncerto de la paroĥa koruso. Ne mankis la kontribuo de Esperantistoj: jam menciita grupo de knabinoj el Ĉeĥio, Gabriel Anda el Kamerunio, Cecilia Brandao el Brazilo kaj Carlo Sarandrea el Italio.

Ĉar la hodiaŭan E-agadon en Rimini forte markas bonfarado al Afriko, dum la publikaj aranĝoj riminianoj havis eblecon ricevi pli da informoj pri aktuelaj projektoj kaj dum aparta kongresa kunsido la bonfarantoj renkontiĝis kun la kongresanoj el afrikaj landoj.

Marija Belošević

Balotoj en la Esperanto-urbo

Esperanto-Societo Sudharco estis fondita en aŭtuno 1976 en Herzberg am Harz. Dum pli ol 30 jaroj okazis en Herzberg multaj interkulturaj agadoj kun gastoj el pli ol 50 landoj. En julio 2006 Herzberg am Harz fariĝis oficiala Esperanto-urbo, kaj Esperanto-Societo Sudharco funkcias kiel konstanta partnero por multaj internaciaj aktivecoj. Krome en Herzberg estas la sidejo de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj kaj la filio de GEA por kulturo kaj klerigado.

Kun diversaj landoj ekzistas interŝanĝprogramoj por lernantoj. La biblioteko kun arkivo kun multaj raraĵoj fariĝis unu el la plej grandaj kolektaĵoj en Eŭropo. La urbo krome disponigas al ni apartan arkivejon en la malnova urbo-domo, Esperanto-salonon en la Domo de la renkontiĝoj kaj apartan Esperanto-loĝejon por volontuloj en la fajrobriĝada domo. Ankaŭ la evoluo de la membrostato estas pozitiva.

11 okt 2008 okazis la jarĉefkunveno de Esperanto-Societo Sudharco kun elektoj por oficdaŭro de tri jaroj.

La multjaran prezidanton Peter Zilvar oni reelektis kiel la prezidanton. Vicprezidanto nun estas Harald Mantz el la najbara urbo Osterode. La dua vicprezidanto fariĝis Harald Schicke, nova loĝanto en la Esperanto-urbo.

Pluaj estraranoj estas Marika Frense el Heiligenstadt, Ursula Zilvar (kasistino) kaj Matthias Reimann. Reelektitaj kasrevizoroj estas Helga Vogelsang kaj Nils Pfennig, krome Rosa Mantz. Thomas Garczarek el Herzberg fariĝis komisiito por la grandprojekto “Esperanto-urbo”. Estroj de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg — estas Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy (vic.)

La nova estraro esperas je bona kunlaboro kun la tuta Esperanto-movado kaj je vastaj subtenoj por krei veran “Esperanto-modelurbon”.

La praktika konstruado de Herzberg kiel Esperanto-urbo havos prioritaton kun multaj internaciaj renkontiĝoj, seminarioj kaj kongresoj. Krome oni planas specialan fondaĵon “Esperanto-urbo” por la multaj praktikaj taskoj kaj internaciaj defioj. Ni volas fondi specialajn komisionojn kaj laborgrupojn por fortigi la surlokajn rimedojn.

Grava defio en 2009 estos la organizado de Germana Esperanto-Kongreso kaj EEU-kongreso en Herzberg.

ICH

Sukcesa pionira studad-sesio de AIS en Banjaluko



Banjaluko: Kandidatoj Dörr kaj Komarnicka ricevas siajn diplomojn de OProf. Quednau, direktoro de la ekzamen-ofico.

Komence de septembro 2008 la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino okazigis provan SUS (SUS = Sanmarineca Universitata Sesio) en Bosnio kaj Hercegovino (PSUS BA), kiu pruvis la eblon tiulande aranĝi SUS-ojn.

Banjaluko, la urbo de la Prov-SUS, situas en la Respubliko Serba de Bosnio kaj Hercegovino, kaj povas esti, ke kelkaj interesuloj estis fortimigitaj de SUS-partopreno pro la politika situacio en najbara Serbio post la aresto de Radovan Karadžić. Tamen la partoprenantoj de SUS povis konstati trankvilon kaj gastamon en Banjaluko. PSUS BA okazis en relative malgranda rondo de malpli ol 20 anoj el 8 landoj, sed kun subteno de la loka universitato kaj sub la lerta organizado de la loka AIS-profeso Ljubiša Preradović, kiu zorgis pri tre agrablaj kondiĉoj kaj riĉa kadra programo.

La studad-sesio estis malfermita dimanĉe, la 31-an de aŭgusto. La malfermon en la festa salono de la banjaluka Akademio de la Artoj, en la rektoreja domo de la universitato, gvidis OProf. Hans Dietrich Quednau, senatano de AIS. La sesion persone salutis kaj bonvenigis Predrag Gluhaković, bosnia-hercegovina ministro; li informis la partoprenantojn pri la nuna situacio en Bosnio kaj Hercegovino, speciale pri planoj de la banjaluka universitato, kaj esprimis la deziron je plua kunlaboro kun AIS SM.

En la stud-programo okazis kvar kursoj de po ok lecionoj, pri jenaj temoj: Geografia informprilaborado (OProf. Quednau)

Teknikoj kaj metodoj de mensa laboro kaj ergonomiaj mezuroj de fizikaj kaj de psikaj pen-elspezoj (EProf. Lewanderska-Quednau)

Informadika modelado (EProf. Preradović)



Bazaj principoj de la religia turismo (EProf. Leonov)

La studentoj utiligis la okazon akiri stud-poentojn (stud-unuojn) per kurs-finaj ekzamenetoj. Plej nova studento estis Vanja Vrhovac, unuajara studento de la loka jura fakultato. Okazis ankaŭ ekzamenoj pri kursoj el la “instru-teko” de AIS; la instru-teko estas kolekto de kurs-materialo (libroj, video-bendoj, retpaĝaroj), laŭ kiuj studentoj povas studi tute sendepende aŭ kun la reta helpo de zorganto; nur la ekzameno okazas sub la kontrolo de AIS-docento.

En la konferenca parto de la sesio okazis prelegoj de EProf. Sara Konnerth, OProf. Eva Poláková, Dr. prof. Zlatko Hinšt, ADoc. Dr. Macko, EProf. Dr. Preradović kaj inĝ Miĉo Vrhovac. Unu prelego devis okazi virtuale, tra reta video-prezentado, ĉar la preleganto ne povis persone alveni.

En la kadra programo la SUS-anoj povis, ĉiĉeronate, konatiĝi kun sia sesi-urbo Banjaluko kaj, ĵaŭde posttag-meze, ekkoni ties ĉirkaŭaĵon: Ili ekskursis laŭ rivero Vurbaso (Vrbas) al Krupa na Vrbasu, urbeto kun mezepokaj urbkerno kaj monaĥejo. Krome ili estis gastoj en la lokaj Esperanto-klubo kaj klubo de etnaj minoritatoj.

Fine de la sesio du kandidatoj defendis en publikaj ekzamenoj la rezultojn de sia studado: Sukcese magistriĝis Małgorzata Komarnicka kaj doktoriĝis Friedrich Josef Dörr, en la sekcioj morfo-scienca kaj hom-scienca de AIS.

La Ĝenerala Asembleo de AIS esprimis la deziron, en 2009 okazigi SUS-on en Bjalistoko, parte dum kaj post la 94a Universala Kongreso de Esperanto. La ebleco tiel kunigi AIS-IKU kaj SUS tamen ankoraŭ ne estas certigita. Ĝenerala deziro estis iam reveni al Banjaluko por plia AIS-sesio.

Reinhard Fössmeier
inform-ofico de AIS

Barlastono: Nur unu komencanto

De la 9a ĝis la 15a de aŭgusto okazis denove en Wedgwood Memorial College, Barlaston, la ĉiujara aranĝo — antaŭe “Somernernejo”, nun de kelkaj jaroj nomata “Somera Festivalo”, ĉar temas pri pli ol “nura” lernado.

Partoprenis entute ĉirkaŭ dudek homoj por kiuj tri instruistoj — Hilary Chapman, Jack Warren kaj Malcolm Jones — gvidis respektive altnivelan, mezan kaj komencantan kursojn.

Bedaŭrinde, nur unu komencanto ĉeestis; tamen la ege lerta Dimitri — rusparolanta latvo, nun loĝanta en Anglio — tiom progresis per intensiva rektmetoda konversaciado, ke fine de la semajno li sukcesis fari mallongan aŭtobiografian prezenton antaŭ la aliaj ĉeestantoj kaj rikoltis sinceran aplaŭdon!

La altnivela grupo pritraktis diversajn lingvajn kaj historiajn temojn, kaj ĉiu membro elektis propran temon por prezentado poste dum la semajno, kio ĝenerale signifis, ke ili pasigis iom de sia libera tempo esplorante en la Biblioteko Butler, kie helpis ilin la bibliotekisto de EAB, Geoffrey King. La rezultoj estis vere aŭskultindaj, kaj unu eĉ jam aperis en la aŭtuna numero de *La Brita Esperantisto*.

Apenaŭ imageblan temvarion (kaj do lingvoinstruon!) montris la vesperaj prelegoj de la tri gvidantoj: “Ostoporo”, “La historio kaj la sorto de Ido” kaj “Memorbildoj el preĝejoj — frotado de latunplatoj”... kaj simile variis la eroj elektitaj de la partoprenantoj por krei laŭtradicie “memfaran”, distran vesperon, kiun bonege reĝisoris Jack, kaj kiun sekvis agrabla “endoma” kurs-fina festeto.

Plia tradicio de Somera Festivalo estas la ĉiuvespera (nedevisa, sed populara) kunvenado en unu aŭ alia el la du barlastonaj tavernoj: tiel prezentiĝas eblecoj por plua praktikado de konversacia kapablo, en tute ne streĉa etoso — kun samtempe publika demonstrado de la funkcia lingvo... do, gravas, ke oni ne neglektu tiun tradicion!

Jam estas planata la venontjara kurso, kiu estos nur dunivela (por komencantoj haveblos anstataŭe du aliaj semajnfinaj kursoj), kaj anstataŭ tutsemajna (sesnokta) kurso, ĝi estos kvin-taga (kvarnokta), de la 10a ĝis la 14a de aŭgusto, 2009, do eble pli “farebla” por pli da homoj. Bonvenas fruaj aliĝoj de someraj festivalanoj!

Malcolm Jones

Du belegaj tagoj en Heinola

La partoprenantoj de la Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) povis ĝui du belegajn tagojn en Heinola meze de septembro. Reprezentantoj de la urbo bonege akceptis nin kaj donis al ni multflankan bildon de la urbo. Ĵurnalisto de la loka gazeto *Itä-Häme* intervjuis sabate la prezidanton Tuomo Grundström kaj nian gaston Fransŭaz Rochette el la kantogrupo *Duoble Unu*. La artikolo aperis komence de la sekva semajno. Tiel Aŭtunaj Tagoj funkciis ankaŭ kiel Ago-tago de finnlantaj esperantistoj.

En la komenco de la tagoj venis la vicĉefino de la urba oficistaro saluti nin kaj rakonti pri la urbo. Tuomo Grundström interpretis esperanten. Kiel dankon pro la amika saluto EAF donacis por la urbo Heinola la finnlandan epopeon *Kalevala* esperantlingve.

Du urbajn muzeojn prezentis al la partoprenantoj la loka muzea ĉefo. Speciale allogis nin en la urba muzeo la granda kolekto de diversaj medaloj el Finnlando, kaj ekestis ideo donaci al la muzeo la medalon pri Vilho Setälä, fama finnlanda esperantisto. Alia vizitcelo estis la plej malnova domo de Heinola — iama oficejo de la provinca poliestro.

Vespere la partoprenantoj ĝuis la koncerton de Fransŭaz kaj kunkantis entuziasme la kantojn *Kaffilaulu* (finne) kaj *Fabellando* (esperante). Ĉeestis ankaŭ kelkaj lokaj vizitantoj, kiuj planis denove aktiviĝi kiel esperantistoj.

Dimanĉmatene Tuomo Grundström prelegis kaj diskutigis la partoprenantojn pri Finnlanda kulturo en Esperantujo.

La rondveturo dimanĉe montris al ni la urbon kaj multe de la ĉirkaŭaĵo.

Tiina Oittinen



Montoj, neĝo kaj Esperanto

Ankaŭ ĉi-jare MKR (MontKabana Renkontiĝo) gvidis siajn partoprenantojn al montoj, ĉi-foje al neĝo kaj frosto de sloveniaj Juliaj Alpoj!

La 19a MKR okazis 25–28 sep en montkabano Uskovnica en Juliaj Alpoj, en nordokcidenta Slovenio. Kvankam proksime troviĝas du plej konataj slovenaj ripozlagoj, Bled kaj Bohinj, kun luk-saj hoteloj, ŝnurliftoj kaj suvenirvend-ejoj, ĉi-jara MKRejo estis modesta montkabano meze de paŝtista altebenaĵo, kun pluraj paŝtist-domoj kiuj ĉi-tempe servas kiel feridomoj.

La aranĝon ĉi-jare partoprenis nur 25 E-montmigremuloj, sed la grupo estis tre internacia, eĉ el ok landoj, inkluzive de unu ĉinino.

Spertaj montmigrantoj vizitis la pintojn Veliki Draški Vrh (2132 m) kaj Tosc (2275 m). La veterkondiĉoj estis ne tre agrablaj, krom malvarmeco (kelkaj gradoj sub nulo ĉe la pintoj) la migrantojn foje ĝenis ankaŭ tre forta vento. Sed indis veni al la pintoj pro bela rigardo (foje limigita pro nebulo) kaj fabeleca aspekto de la ĉirkaŭaĵo, rokoj, herboj kaj arbustoj, kovritaj per maldika glacia kovrilo — malkutima aspekto, eĉ por tiel altaj pintoj!

Promenantoj, inkluzive de familioj kun infanoj, elektis pli malstreĉajn celojn. Unutage oni vizitis paŝtejon Konjščica (1438 m) kaj alitage akvofalon Mostniški slap kaj najbaran valon Voje. Infanoj amuziĝis kurante tra arbaro kaj ludante ĝis kiam gepatroj kaj aliaj havis iom da tempo por kafumado kaj gustumado de lokaj kukoj.

Vespera programo estis limigita per restantaj fortoj de migrantoj, sed ne mankis bona etoso kun societaj ludoj, rakontoj, ŝercoj... Infanoj amuziĝis samtempe per amaso da ludiloj, papero kaj kraĵonoj, krome estis por ili amuze rigardi ĉevalojn kiuj foje kuris tra paŝtejo apud la ejo.

La aranĝo finiĝis per dimanĉa promenado kaj fina tagmanĝo en loka gastejo en vilaĝo Srednja Vas. Dum la tagmanĝo finfine la suno montriĝis, kaj ni forlasis la aranĝon kun pensoj: “Ĝuste nun estus bona momento por fari novajn ekskursojn!” Sed la aranĝo jam estis for, ni revidos unu la alian post unu jaro en Kroatio, plej verŝajne apud la fama nacia parko Paklenica!

Vanja Radovanović

Fransŭaz Rochette kantas en Heinola (*Fotis Päivi Saarinen*)

Denove ERT en Taguatinga

Sub la temo “Esperanto en Taguatinga”, Taguatinga E-Klubo (TEK) 21 sep 2008 okazigis la 11an Esperanto-Renkontiĝon de Taguatinga (ERT) kun entute 120 ĉeestantoj.

La renkontiĝejo estis la aŭditorio de la pioniroj ĉe la administrejo de la antaŭurbo Taguatinga. Priteme prelegis la prezidantino de la klubo, Sufia Alves Lima, kiu abunde projekciis diapozitivajn pri historiaj momentoj de la evoluo de Esperanto en la 50-jara antaŭurbo Taguatinga.

La arta parto de la renkontiĝo konsistis el prezentadoj pri muziko, kanto kaj teatraĵoj de: ensemblo *Nova Erao* (pedagogia skipo kaj gelernantoj de la lernejo Lazaro Ludoviko Zamenhof); kantistino Klara Fonseca, filino de la konata Esperanto-artisto Flávio Fonseca; kantisto kaj komponisto Tarcísio Lima el Fortalezo. Neudo Lima, profesoro pri teatro-arto, prezentis pup-teatraĵon.

Fine, la prezidantino de TEK anoncis, ke la 12a ERT okazos 20 sep 2009 kun la temo “150-jara naskiĝdato de L.L. Zamenhof”.

Carlos Maria

ZOMAER tradiciigās

En la brazila urbo Ubá (Minas Gerais) 14 sep okazis II ZOMAER (la dua Zona-da-Mata Esperanto-Renkontiĝo) kun la ĉeftemo “Esperanto, kiel efike disvastigi ĝin?”

Post la oficiala malfermo de la renkontiĝo, kiam oni kantis la himnon *La Espero*, pri la ĉefa temo prelegis d-ro Maurício Monken. La aŭdantaro estis invitita paroli pri la temo kaj pri siaj personaj spertoj rilate al efika disvastigo de Esperanto.

Post la tagmanĝo Márcia V. Colli kaj Wörner M. Arruda prelegis pri la historio de Esperanto en Ubá, kie naskiĝis famaj brazilaj esperantistoj, kiel Ismael Gomes Braga. Post tiu prelego Wendel Pontes parolis pri strategioj de defendo kaj atako inter insektoj.

En la arta vespero oni aŭdis belajn brazilajn muzikojn de flutisto kaj violonisto. Koruso de komencantoj ankaŭ prezentiĝis per esperantaj kantoj. Religia muzik-grupo kantis portugale kaj esperante.

Fine oni transdonis la flagon al la urbo kiu organizos la trian ZOMAER en 2009.

Wendel Teles Pontes

Triajoje en San-Paŭlo

Tri atentovekaj rubandoj en oportunaj lokoj de la urbo Lorena dum dek antaŭkongresaj tagoj informis pri la 3a Kongreso de Esperanto en Ŝtato San-Paŭlo, kun la ĉeftemo “Internacia Jaro de Lingvoj”, kiu okazis en Lorena 10–12 okt 2008.

La kongreso, kun preskaŭ cent partoprenantoj, ĝuis atenton de lokaj amas-komunikiloj kaj subtenon de urbaj instancoj. La malfermon ĉeestis reprezentanto de la urbo, kiu salutis kaj donacis materialon pri la urbo al la organizantoj. Post himnoj kaj salutoj, pri la ĉeftemo festparolis prof. José Passini, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo.

La kongresa programo enhavis multajn prelegojn pri diversaj temoj. Dum la dua tago, matene kaj posttagmeze, Jair Salles instruis per ekspresa kurso. La lastan tagon oni okazigis viglan debaton kun partopreno de multaj ĉeestantoj pri la temo de la kongreso, sub kunordigo de la prezidanto de EASP, Genildo M. Coelho. La vesperon de la meza kongresa tago, oni aŭskultis altnivelan violonan kaj gitaran ludadon kaj kantadon fare de José Inácio, Ivan Guimarães kaj Pedro F. Silva. Okazis rapidaj demonstroj de kalkulado per abako fare de José Linck.

Dum la kongreso funkciis libroservoj de EASP kaj de la eldonejo *Oportuno*. Estis lanĉitaj du libroj: novelaro *Geedza Kanzono* de Machado de Assis kaj infanlibreto *Breno kaj Lilika* — respektive traduko kaj originalaĵo de Paulo S. Viana. Amarílio Carvalho vendadis siajn Esperanto-ĉemizojn kaj Mirna Duarte intervjuis plurajn kongresanojn por sia radioprogramo *Parolu, mondo!*

Post la fermo oni vizitis la monumenton al Zamenhof en proksima placo, kaj tie oni multe fotis grupe kaj grupete (*vidu sube*). Por la 4a kongreso sin proponis grupo el la urbo San-Karlo.

Paulo Sérgio Viana



La 7a SER en Rio

“Vi ĉiam surprizas nin!” — jen la ĉefa opinio de la plimulto inter 86 surlo-kaj ĉeestantoj kaj ankaŭ de 19 “interretanoj”, kiuj partoprenis la 7an Spiritan Esperantistan Renkontiĝon 14 sep 2008 en Rio-de-Ĵanejro.

La ĉefpreleganto Paulo Sérgio Viana dum unu horo parolis pri la ĉefa temo, “Jesuo; Fonto de Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto” kaj poste respondis demandojn de ĉeestantoj. Ankaŭ retanoj demandis kaj ricevis respondojn rete.

La arta programo enhavis muzikon, poezion kaj skeĉon. Marielza Tiscate kantis naciajn popolkantojn portugale kaj Esperante. Du lernantoj de Esperanto-grupo *Lazaro Luiz Zamenhof* (Cezaro kaj Lino), deklamis dulingve la poemon *Esperanto*, kiu en 1946 estis mediume ricevita de Castro Alves per la mediumo Chico Xavier. Dek unu gelernantoj prezentis la humuran skeĉon *Frenezaĵoj en klasĉambro*, la ĉeestantoj multe ridadis pri la skeĉo. Ĉiuj kantoj kaj poemoj estis montritaj sur ekrano dulingve, kaj la skeĉo estis prezentita dufoje (dulingve) por helpi la grandan nombron de komencantoj kaj neesperantistoj.

Fine ĉiuj kantis *La Esperon*. La 8a SER, kiu okazos 13 sep 2009, havos kiel la temon la 150-jariĝon de Zamenhof.

Paulo Kverko

Interdanca informado

“Vi rememorigis mian junecon, dankon!” — diris multaj el la 186 ĉeestantoj de la “Revivanta balo”, kiun Esperanto-grupo *Lazaro Luiz Zamenhof* realigis 20 sep en Rio-de-Ĵanejro.

Dum la balo, kiu daŭris ĝis la nokto-mezo, unue oni prezentis sur ekrano la historion de televido en Brazilo ekde ĝia inaŭguro en 1950, poste danc-muzikojn de la jaroj 1950, 1960 kaj 1970. Estis elektitaj kvar stiloj por kontentigi ĉiujn ĉeestantojn. Inter ĉiu el la kvar 25-minutaj prezentadoj oni parolis pri Esperanto kaj prezentis Esperanto-muzikon dum minutoj.

Post tri horoj dek kuraĝuloj partoprenis konkurson de amatoraj kantistoj, kaj post la konkurso oni ripetis la danc-muzikojn kaj Esperantajn kvinminutajn “gutojn”, kaj do la balo funkciis kiel ago-tago.

Je la fino ĉiuj (feliĉegaj) dankis al la organizantoj kaj petis plian balon, kelkaj decidis tuj eklerni Esperanton.

Paulo Kverko



Katalunio: celtrafa informado

Por la kvina sinsekva jaro Kataluna Esperanto-Asocio havis budon en la Asoci-Foiro apud la Triumfa Arko en Barcelono, okaze de la nacia tago de Katalunio, la 11an de septembro.

El ĉiuj budoj starigitaj dum la jaro, tiu septembra kutime estas la plej fruktodona je niveloj profita kaj socia. Tial ni aparte prizorgis tiun budon, kie sub granda afiŝo, prezentanta nian agadon, starigitaj flugfoliuj enhavis disvastigilojn pri la principaro de la Asocio, pri Esperanto kaj pri la baldaŭ okazonta kongreso. Sur la tablo kuŝis diversnumeraj ekzempleroj de *Kataluna Esperantisto*, DVD-oj de E@I, kaj libroj por disvendi: lernolibroj kaj vortaroj, libroj en Esperanto, nacilingvaj libroj pri Esperanto, lingvistiko, diverseco, paco kaj lingvaj rajtoj.

La bulteno de KEA sukcese malaperis el la budo antaŭ la tagmezo. Inter disvendadoj furoris *Tinĉjo*, vortaroj kaj la kurso de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo. Elstaras la disvendo de 20 DVD-oj de E@I.

La monprofito estis rekorda. Laŭ socia profito, ĉi-jare kreskis intereso al ĉeestaj kursoj, kaj tial ni kolektis kelkajn kontaktojn por informadi. Dum la unuaj jaroj estis foje necese klarigi, pri kio temas Esperanto.

Lastatempe preterpasantoj scias pri kio ĝi temas kaj simple demandas pri ĝia iro, ĝia sukceso, ĝia utilo, ĝia aspekto... kaj pri kursoj kaj aranĝoj. Verŝajne inform-tasko de KEA dum la lastaj jaroj iom atingis socion.

Ferriol Macip i Bonet

Semajno de Kulturo Internacia

18–25 sep en la ĉirkaŭaĵoj de Pizo (Italio) sukcese pasis la unua Semajno de Kulturo Internacia, iniciatita de la Itala Esperantista Junularo kunlabore kun la urbestroj de la komunumoj San Giuliano Terme, Cascina, Calci, Vecchiano, Buti kaj Vicopisano. Krom italoj, kiuj prizorgis la necesajn tradukojn, ĉeestis kvar rumanoj, po du aŭstroj, francoj, hungaroj kaj slovakoj, po unu belgino, brazilano, slovenino kaj vjetnamino — entute 22 personoj.

La eksterlandaj gastoj estis ĉiutage invitataj en lokajn lernejojn por rakonti al la lernantoj pri siaj landoj, lingvoj kaj kulturoj. Ili prezentis en Esperanto, kaj la italoj tradukis.

Ĉiu eksterlandano libere elektis la plej taŭgan manieron prezenti sian patrujon: ĝenerale oni ludetis muzikilojn, kantetis popolajn kantojn, prezentis tradiciajn vestaĵojn, montris bildojn kaj flagojn, aŭ instruetis kelkajn vortojn el sia gepatra lingvo. La mezlernejaj knaboj (11–13-jaraj) ofte scivolemigis kaj haltigis la prezentaĵojn per demandoj. Aldone venis multaj demandoj pri Esperanto.

Lernantoj tre ŝatis slovenan ludeton de Vesna Obradović, multe demandis al Thu Quynh Nguyen pri la vjetnama lingvo kaj ĝia plurnuanca prononco, kaj surprize malkovris, danke al Ionel Bodale kaj lia familio, ke la rumana lingvo ege similas al la itala, kvankam Rumanion ĉirkaŭas nelatinidaj lingvo-regionoj.

Dum la semajno okazis pluraj vesperprogrameroj, dum kiuj la lokanoj kaj la gastoj povis ĝui teatraĵojn aŭ koncertojn rilatajn al Esperanto.

20 sep la roma aktoro Mario Migliucci surscenigis sian teatraĵon

Doktoro Esperanto. La sekvan vesperon Gianfranco kaj Giuliano Molle ludis en trinkejo esperantigojn de la plej ŝatataj kantoj de Fabrizio de André. 24 sep Piero Nissim fermis la iniciaton per ĉarmega koncerto de jidaj kaj aliaj kantoj tradukitaj en Esperanton.

Dum la semajno okazis multenombraj aliaj programeroj, ĉefe organizataj de la komunumoj, kiuj afable zorgis pri siaj eksterlandaj gastoj per gvidataj vizitoj kaj bongustegaj manĝoj. Estis vizitata la scienca centro *Virgo* kie situas grava esploro pri gravitaj ondoj, mirinda natura parko San Rossore, komunumoj Buti kaj Vicopisano. Okazis ankaŭ trajna ekskurso al Lucca.

Sabaton (20 sep) okazis solena ceremonio memore pri la antaŭnelonge mortinta esperantisto Giuseppe Martini, en kiu parolis la urbestro kaj Brunetto Casini, posteulo de Martini kiel prezidanto de la Piza Esperanto-Grupo.

Post la ceremonio devintus okazi piedpilka matĉo kontraŭ lokaj junuloj. Laŭ la tradicio, esperantistoj neniam gajnas tiajn matĉojn. Surprize, la loka teamo ne venis, sed la tradicio estis respektita: la esperantistoj dividiĝis en du teamojn, kiuj interŝanĝis po kvar golojn, kaj do ankaŭ ĉi-foje neniu esperantista teamo gajnis la matĉon.

24 sep okazis komuna vespermanĝo baze de tradiciaj pladoj, kuiritaj de la gastoj, kaj tipaj toskanaĵoj prizorgataj de la urbestroj. Vesna el Slovenio pretigis tipan slovenan salaton. Mariana kaj Tünde el Hungario okupiĝis pri krespoj kaj gulaŝo. Marion el Francio kuiris tri bongustegajn ĉokoladajn kukojn. Sed Thu Quynh ne povis kuiri tipajn vjetnamajn manĝaĵojn pro manko de hundo- aŭ serpento-viando kaj prizorgis kelkajn tradiciajn rizaĵojn.

Fabio Bettani



Hungario: du kultur-eventoj

Libroekspozicio

En la Miŝkolca Departamenta Biblioteko "II. Rákóczi Ferenc" 17 sep 2008 estis malfermita Esperanto-libroekspozicio. Ĝin inaŭguris d-ro Georgo Nanovfszky, honora prezidanto de HEA. La titolo de la ekspozicio estas: *UEA 100-jara*. La eventon faris grava ankaŭ la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2008 kaj la Esperanto-instruado en Miŝkolco, havanta 95-jaran datrevenon.

Kvaronjarcenta jubileo

Laŭ iniciato de geedzoj Pásztor, la urbestro de Abaújszántó festis la 25-jaran jubileon de la Memorĉambro de Kolomano Kalocsay en ĉi tiu urbo.

27 sep post salutvortoj de la urbestro Georgo Madár kaj de la Hungaria Esperanto-Asocio (HEA), Adrienne Pásztor laŭtlegis la poemon *Al stelo* de Mihai Eminescu en la traduko de Kalocsay.

Loka poeto kaj kantisto István Nagy kantis du kantojn laŭ poemoj de Petőfi, tradukitaj de Kalocsay, kaj deklamis sian propran poemon. Sekvis flormetado, kandellumigo kaj pliaj deklamoj, interalie, de lokaj lernejanoj (*vidu la suban foton*), kiuj studas Esperanton en la kurso de Ildikó Széppataki.

Adrienne kaj László Pásztor



Fotis László Pásztor

Revidi siajn amikojn...

4 okt okazis en Chester ĉiuaŭtuna kunveno de Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio (de Anglio).

Printempe en la Esperanto-Kongreso de Britio la federacio celebris sian centjarigon. Nun kunvenis du dekoj da esperantistoj en la hotelo *Eaton*. La kunvenintoj estas plejparte maljunaj (tamen pli junaj ol la federacio) kaj malnovaj (krom unu novulo) esperantistoj. Do la ĉefa ĝuo por la kunvenintoj estis revido de siaj amikoj. Prelegis Malcolm Jones pri Komenio. Partoprenis kelkaj gastoj unuafoje kiel Geoffrey Sutton, Leonio Marobin k.a.

Peeter Aitai



La Majstro ricevas honoran lokon en la nova muzeo.

Nova Esperanto-muzeo en Ĉeĥio

20 sep malfermiĝis nova Esperanto-muzeo en la ĉeĥa distrikta urbo Svitavy. En tiu distrikto troviĝas ankaŭ la urbo Litomyšl, kiun konatigis al esperantistoj ĝia enloĝanto kaj fama Esperanto-verkisto Karolo Pič per sia romano *Litomišla tombejo*.

Laŭjure ĝia posedanto estas Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sed la konvenan salonegon en belega historia konstruaĵo, nomata laŭ siaj fondinto kaj origina funkcio "Biblioteko de Ottendorfer", disponigis la urbo Svitavy pere de sia muzeo.

En la urba muzeo estis ĝis nun du bazaj daŭraj ekspozicioj: pri la plej fama loka naskito Oskar Schindler, savinto de multaj judoj dum la dua milito, kaj pri la tolaĵlavado kaj lavmaŝinoj. Esperanto do iĝis la tria baza temo en ĝi. Finance subtenis la starigon de la muzeo Ministerio pri kulturo de Ĉeĥa respubliko, Esperantic Studies Foundation kaj la urbo Svitavy.

En la solena malfermo, kiun partoprenis 146 ĉeestantoj, post la Esperanta himno tre favore al Esperanto parolis la urbestro de Svitavy Jiří Brýdl, kiu helpis al ni akiri la monsubtenon de la Ministerio pri Kulturo.

La historion kaj Esperanton iom prikskribis la prezidantino de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio Jana Melichárková. Salutparolis ankaŭ la direktoro de la Esperanto-muzeo en Vieno Herbert Mayer kaj la gvidanto de Esperanto-Centro *Marie Hankel* en Dreseno Wolfgang Schwarz.

La solenecon substrekis mallonga koncerto de la laŭreatino de multaj internaciaj konkursoj Elena Puchova kune kun ŝia filo, 16-jara tenoristo Dmitrij Dovjik.

Post la enkonduka parto la urbestro kun la prezidantino de ĈEA kune tratondis la rubandon, kaj la unuaj vizitantoj

povis konatiĝi kun la starta ekspozicio de la nova muzeo.

La muzeo konsistas el du partoj. En la deponejo estas libroj kaj labortablo kun komputilo por volontulaj prizorgantoj de la muzeo, nome membroj de la loka Esperanto-klubo. Pli granda spaco servas kiel ekspoziciejo, en kiu nun la unua ekspozicio prezentas la lingvon Esperanto kun ĝiaj kulturo kaj movado. Por tiuj celoj servas 13 surmuraj paneloj kaj 5 tablovitrinoj, por libroj ankaŭ vico de 9 vitroŝrankoj. El unikaĵoj de la kolekto ni nomu ekzemple originalon de la unua lernolibro de Esperanto por ĉeĥoj el la jaro 1890, kompletan jar-kolekton de japana gazeto el la jaro 1912 mane kudre binditan, sur manpapero, aŭ buston de L.L. Zamenhof, kiu estis skulptita plej verŝajne okaze de la 13a UK en Prago, prunteprenitan de la urba muzeo en Česká Třebová.

Sed la muzeo ne estos nur aro da ekspozitaĵoj! Por vizitantoj certe estos tre interesa la multifunkcia informpanelo kun tuŝkrano, per kiu oni povos konatiĝi kun la lingvo, kun ĝia gramatiko kaj eĉ aŭdi ĝin, kaj deklamitan, kaj kantatan. Krom ĝi servos al esploristoj kaj studentoj tablo kun komputilo, ene de kiu troviĝas multaj utilaj datenoj, inter aliaj ankaŭ grandaj ĉeĥa-Esperanta kaj Esperanta-ĉeĥa vortaroj kaj katalogo de la biblioteko de ĈEA.

La Esperanto-muzeo jam levis konsiderindan konscion pri Esperanto en la regiono: feliĉe, la sekvan tagon (21 sep) post la malfermo, okazis en Svitavy "Tago de malfermitaj pordoj", dum kiu ĉiuj muzeoj estis senpage viziteblaj. Tio altiris denove dekojn da interesatoj en la novan muzeon.

Por mi surprize, mi estas invitita prelegi en Svitavy 25 kaj 26 nov: marde en Komerca akademio kaj en la Esperanto-muzeo por publiko, merkrede en la gimnazio kaj en la Universitato de la tria aĝo. Sendube, tio okazos danke al la malfermo de la Esperanto-muzeo. Mi konfesas, ke unuafoje en mia vivo mi havos okazon prezenti Esperanton sinsekve kvarfoje dum du tagoj al tiom malsimila publiko.

Nun ni devas strebi, ke la intereso restu laŭeble daŭra, ke la urbaj instancoj vidu la efikon de la muzeo por la vidigo de la distrikta urbo Svitavy. Tiam espereble ne velkos ilia simpatio por ĝi kaj por Esperanto.

Por kontaktoj:

<http://www.muzeum.esperanto.cz>

muzeum@esperanto.cz

Petro Chrdle

Lerni kaj ripozi ĉe Mediteraneo

La partoprenantoj de la 34a Internacia Semajno de Esperanto en Sète (23–30 aŭg 2008) ne nur ĝuis la bluajn maron kaj ĉielon, sed antaŭ ĉio ili fervore lernis kaj praktikis Esperanton.

Ĉiu povis elekti laŭ sia lingva nivelo el la tri lingvokursoj: porkomencanta de Anne-Marie Petre por gejunuloj kiuj lernis ludante, paroliga de Hanna Cayzac (Pollando), kaj perfektiga de Svetlana Smetanina (Ruslando).

Dum la staĝo funkciis mozaikateliero, en kiu dum kvar posttagmezoj la mozaikista teamo fabrikis por venontaj staĝoj belan tablon, kun figoj kaj verda stelo... Funkciis ankaŭ ateliero pri roz-cirkloj. Oni aŭskultis kelkajn interesajn prelegojn. En la kvar ekskursoj partoprenantoj povis viziti tre belan ĉirkaŭaĵon, interalie ankaŭ olivarbaran bienon.

La vespero de krad-rostado venigis regionajn samideanojn kiuj ĝis la nokto mezo aldonis siajn voĉojn al la “staĝa koruso” kaj helpis malplenigi kelkajn regionajn vinbotelojn! Fine de la staĝo okazis ekzamenoj, kiujn sukcesis 13 staĝanoj.

Ni profitis ne nur la belegan veteron kaj la mediteranean varman akvon (plaĝo situis je 50 metroj de nia feriejo) sed ankaŭ la bonan humoron de ĉiuj. Koran dankon al la organizinto, Jean François Passarella, kiu jam invitas al la 35a Internacia Semajno ĉe Mediteraneo, okazonta 22–29 aŭg 2009.

Hanna Cayzac

ĈEA: nova estraro, nova emblemo

La unuan oktobran semajnfino en la moravia urbo Přerov okazis la 12a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA) kun pli ol cent partoprenantoj inkluzive de gastoj el Germanio, Pollando kaj Slovakio.

La kongreso elektis novan komitaton, kiu gvidos la asocion dum la sekvaj tri jaroj: prezidantino Jana Melichárková, vicprezidantoj Petro Chrdle kaj Jiří Tomeček, sekretario Pavel Polnický, kasistino Libuše Hýblová, membroj Pavla Dvořáková kaj Miroslav Malovec. La kongreso elektis ankaŭ novajn honorajn membrojn de ĈEA.

La nova komitato ricevis taskojn, interalie: altigi la nivelon de la elektronika komunikado tiel ke ĉiuj funkciuloj, kluboj kaj sekcioj estu rete atingeblaj, kaj krei grupon por kunordigo de lerneja instruado de Esperanto.



Estis anoncita la rezulto de la konkurso pri nova logoo de ĈEA. Ĝin gajnis Jindřich Havlík el Prago, kiu lerte kunmetis la tradician Esperanto-stelon kun folio de ĉeĥa nacia arbo tilio kaj la mallongigo “ĈEA”.

La direktoro de Komenio-Muzeo František Hýbl en sia kongresa prelego multe menciis la prilingvajn verkojn de Komenio kaj liajn tiukampajn posteulojn, inkluzive de Zamenhof. Pli ol 70 kongresanoj uzis la rajton senpage viziti la muzeon.

La kongreson aŭspiciis la urbestro Jiří Lajtoch, kiu ĉeestis la solenan malfermon de la kongreso.

La kongreso de ĈEA okazas ĉian trian jaron, ĉar la mandato por la komitato estas trijara. Dum la nekongresaj jaroj ĈEA organizas konferencojn, kiuj similas al kongresoj; kun ununura diferenco, ke ne okazas balotoj. La venonta ĈEA-konferenco okazos 9–11 okt 2009 en Svitavy, la urbo de la plej nova Esperanto-muzeo.

Petro Chrdle

En la ĉefurbo de Serbio

15 sep en la serbia pedagogia muzeo en Beogrado, post enkonduko de magistro Radojica Petrović, prezidanto de ILEI, ekfunkciis ekspozicio “Esperanto — lingvo de interkompreniĝo kaj amikeco”. Inter la eksponitaj gazetoj estis ankaŭ *La Ondo de Esperanto*. Kadre de la ekspozicio estis prezentita plurlingva vortaro *Poligloto* kun 1260 vortoj en la serba, Esperanto kaj dek aliaj lingvoj.

La ekspozicio daŭris dek tagojn.

Dimitrije Janičić



Unufraze

★ Stefano Keller, reprezentanto de UEA ĉe la Homrajta Konsilio de UN, en ties sesio 17 sep en Ĝenevo faris nelongan paroladon pri UEA. (Landa Agado)

★ Okaze de Eŭropa Lingva Tago en la reprezentejo de Eŭropa Parlamento en Ljubljana (Slovenio) ekspozicion pri Eo malfermis eŭrop-parlamentanino Ljudmila Novak, al kiu Zlatko Tišljar transdonis medalon k diplomon pri honora membreco en EEU. (*Eŭropa Bulteno*)

★ En la nova studenta kvartalo de Manosque (Francio) laŭ peto de la asocio *Esperanta Kulturo en Manosque* unu el la stratoj ricevis la nomon Zamenhof. (*La Sago*)

★ Dum la Longa Nokto de la Muzeoj en Aŭstrio (4 okt 2008) 1 mil 485 personoj vizitis la Internacian E-Muzeon en Vieno — 12% pli ol 2007. (Leopold Patek)

★ 27 aŭg – 7 sep E-Asocio de Brazilia k Taguatinga E-Grupo denove partoprenis en la librofiro en la brazila ĉefurbo per ekspozicio de E-tradukoj de tutmonde konataj verkoj. (BEL informas)

★ La asocioj *Esperanto-Limousin* k *Esperanto-Indre* kunorganizis en la E-kulturdomo Greziljono renkontiĝon *Por ekologia vivmaniero* kun 150 vizitintoj de la publika Tago de malfermitaj pordoj. (*La Sago*)

★ Oficiala versio de la retnaviga programo *Firefox* (Fajrovulpo) aperis en Eo danke al la tradukado de teamo gvidata de Eduardo Trápani el Urugvajo. (*Libera Folio*)

★ La muzeo de la hungara lingvo en Széplalom eldonis informilon en Eo aldone al la pli fruaj versioj en la angla, germana k turka. (Landa Agado)

★ 41 partoprenintoj de la jarkunveno de la Ĉina filio de IKEF (11–13 okt, Xiamen) interŝanĝis komercajn informojn, diskutis pri kunlaboro k subskribis kelkajn kontraktojn k protokolojn pri komerco k kunlaboro. (Landa Agado)

★ En 2007 la membraro de la Norvega E-Ligo malkreskis de 221 ĝis 207; dum la lastaj dudek jaroj ĝi falis je 47%. (*Norvega Esperantisto*)

★ Estas elektita nova estraro de la Varsovia Filio de la Pola E-Asocio: prezidanto Mariusz Majewski, vicprezidanto Irena Łowińska, sekretario Alina Mozer, kasisto Elżbieta Szczerkowska. (*Pola Esperantisto*)

★ Andy Künzli el Svislando k Alejandro Cossavella el Argentino estos la ĉefaj gastoj en la 29a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, kiu okazos 29 nov 2008. (GK UEA)

Kontraŭ anglalingva imperialismo



Parolante en konferenco pri malpli uzataj lingvoj en Eŭropo, la ĉefo de la liberala grupo en la Eŭropa Parlamento, Graham Watson, devojiĝis de la preparita teksto de sia parolado.

“Kiel skoto, mi estas pli kaj pli konsternata de la danĝeroj de la kreskanta imperialismo de la angla lingvo. Povus esti io, pro kio ni povas kulpigi niajn usonajn kuzojn”, — diris Graham Watson, elektita en sudokcidenta Anglio. Agnoskante la nerespekton de internaciaj

traktatoj de pluraj EU-ŝtatoj kun malpli uzataj lingvoj, Watson diris ke la Eŭropa Unio devas forgesi pri landlimoj, kiam temas pri lingvoj. La liberaluloj en la Eŭropa Parlamento lastatempe lanĉis kampanjon por ununura lingvo. La kampanjo konsternis plurajn homojn en Bruselo, ĝis kiam ili vidis ke temas pri “simpla kaj klara lingvo”.

“Kelkaj ŝtatoj havas malpli pozitivan historion. Tro ofte en la pasinteco registaroj evitis sian devon agnoski kaj sekurigi la lingvojn parolatajn en siaj teritorioj, — daŭrigis Watson. — Kiel al liberalulo, oni ne devas klarigi al mi, ke ĉiuj ŝtatoj devas plenumi siajn internaciajn devojn”.

Ankaŭ se la Eŭropa Unio volas esti je la flanko de la civitanoj, ĝi devas strebi, ke laŭeble multe estu ebla en la propra lingvo de la civitano. Watson notis, ke probable EU baldaŭ havos plian lingvon, la turkan, post kiam estos atingita fina akordo inter la du komunumoj de la insulo Cipro.

La konferenco okazis la 14an de oktobro, je la komenco de la pintkunveno de la ĉefoj de EU.

Dafydd ab Iago

Ne nur Ĉeĥio

En la 7a kajero de LODE aperis artikolo *Esperanto estas morta lingvo*. Tiujn opiniojn mi ofte aŭdis pri Esperanto. Ankaŭ mi aŭdis, ke ĝi estas juda lingvo, kaj pro tio iuj ne volas ĝin lerni.

Sed ne temas pri tio. Mi ne konsentas kun la aŭtoro de la artikolo, ke Ĉeĥio estas unu el la ok landoj, kiuj ĝis nun ne ratifis la Lisbonan traktaton. Ja ankaŭ la prezidento de Pollando ne volas subskribi la traktaton. Li diras, ke ĉar Irlando ne subskribis, do egale estas, ĉu li subskribos ĉu ne.

Sed mi pensas, ke temas pri tio, ke la frato de la pola prezidento ĝis nun ne povas konsenti pri la malvenko en la lastaj balotoj, kiam li kaj lia partio havis tro malmulte da apogantoj por plu regi en Pollando. Li nun ofte estas en *Radio Marya*, kiu estas kontraŭ la Eŭropa Unio, kontraŭ la traktato. Tie elpaŝas diversaj nacionalistoj, antisemitoj, kontraŭuloj de EU. Dezirante havi apogon de la aŭskultantoj de *Radio Marya* en la venontaj balotoj por si, por sia partio, kaj por sia frato, kiu deziras denove esti prezidento en la estonta periodo, li influis al prezidento Kaczyński, kaj tiu nun ne volas subskribi la traktaton, kvankam antaŭe batalis por ĝi.

Do, ne nur Ĉeĥio ne subskribas. Prezidento Kaczyński renkontiĝis kun la prezidento de Ĉeĥio, kaj eble ili kune interkonsentis pri tiuj ĉi aferoj? Mi ne ĉeestis iliajn interparolojn.

Pollandano

Helpi junajn afrikajn esperantistojn

Dum nia vojaĝo post la Konferenco de ILEI en Benino ni proksime de Lokossa vizitis orfejon, en kiu krom alia estas instruata Esperanto. Kontaktojn kun la orfejo tenas Latifou Gbadamassi kaj François Hounsounou. Mi vizitis la orfejon ankoraŭ foje dum la tuta tago kun François kaj instruis tie Esperanton al la plej malgrandaj infanoj.

La vivsituaĵo de tiuj infanoj estas tre malfacila. Ili devas multe labori en kampoj por havi almenaŭ ion por manĝi, ĉar la financaj fontoj ne sufiĉas. Kaj mi eĉ ne parolas pri vestaĵoj, lernejoj, elspezoj kaj foje malsanoj. Mi decidis kunlabori kun François kaj la neregistara organizo, kies fondinto kaj prezidanto li estas, kaj trovi por tiuj infanoj subtenantojn.

Laŭ la direktoro plej necesas helpi unue infanojn, kiuj perdis ambaŭ gepatrojn, kaj poste tiujn, kiuj havas ankoraŭ unu de la gepatroj. Unue temus pri infanoj 12–14-jaraj, kiuj devos forlasi la orfejon jam post kelkaj jaroj, kutime kiam ili iĝas 18-jaraj. Se ili povus havi decan edukadon, ili pli bone povus prizorgi sin mem post la forlaso de la orfejo.

Ni proponas pagi 15 eŭrojn po infano kaj monato — por ŝpari sendokostojn oni pagus por duona jaro, kaj eblos sendi monon al mia konto en Belgio, el kiu mi sendos ĉion kune al la konto de la neregistara organizo (vi povus pagi rekte mem, sed la kosto de la transpago estas ĉirkaŭ 40 eŭroj). La organizo poste pagos al la orfejo, sen depreni ion ajn por la servo, kaj poste — ankaŭ senpage — kontrolos la elspezojn kaj raportos pri tio. Ĉiu havos skriban kontrakton kun la infano pere de la organizo. Plej bone estus, se ĉiu persono, kiu partoprenos tiun projekton, povus pagi ĝis la infano forlasos la orfejon, sed se iu pro iu kialo ne plu povos/volos pagi, ni klopodos trovi anstataŭanton. Mi kolektos nomojn — ne nur de esperantistoj — dum septembro kaj oktobro ni faros praktikajn paŝojn, ekskribos kontraktojn ktp.

Dum mia unusemajna restado en Lokossa mi aĉetis keston da sapo kaj transdonis ĝin kun restinta mono al la direktoro de la orfejo, li kaj la infanoj ege dankas al ĉiuj!

Mi konscias, ke pluraj homoj jam subtenas infanojn pere de aliaj projektoj kaj programoj. Sed dum la tri tagoj, dum kiuj mi ekkolektis nomojn, mi ankaŭ komprenis, ke multaj homoj ŝatus helpi, sed ne ŝatus sendi monon al grandegaj organizoj, kie multe da mono estas elspezata por administrado aŭ kie ne eblas bone kontroli la elspezojn. Nia iniciato estas eta, sed ĝi havas grandan sencon kaj estas ege konkreta.

 sciuro@seznam.cz

Vladka Chvatálová



Vladka Chvatálová en la orfejo

Kial ni ne aĉetas librojn?

En oktobro Paulo Sérgio Viana, raportante pri la 73a Esperanto-Renkonto de la Paraíba Valo, skribis, ke tie oni debatis pri la temo “Kial Esperantistoj preskaŭ ne aĉetas librojn?” Ni petis lin pli detale rakonti pri la debato.

La debato daŭris pli ol unu horon. Post 10-minutaj paroladetoj de kvar homoj intervenis ĉeestantoj. Jen la resumo:

1. Neaĉetado de libroj ne estas nur Esperanto-movada fenomeno. Almenaŭ en Brazilo ĝi estas ĝenerala fenomeno. Eĉ homoj, kiuj frekventas kursojn de fremdaj lingvoj, post la kurso malofte aĉetas librojn en la lernitaj lingvoj.

2. Unu preleganto emfaze insistis, ke la problemo ne estas de aĉetado, sed de legado kaj de kulturo. Se oni ne edukas en la familio kaj en lernejoj, ke legado estas esenca kutimo por kleriĝo, tiam infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj ne akiras tiun kutimon.

3. Interreto kaj televido kompreneble iom malhelpas aĉetadon kaj legadon de libroj, pro la troa rabado de tempo. Aliflanke, tre malofte homo legas longajn tekstojn sur ekrano de komputilo. La kulturo, perata de tiuj rimedoj, estas multe pli supraĵa ol tiu, kiun peras libroj.

4. Diabla cirklo formiĝas pro la malsufiĉa komercado de libroj en Esperanto. Oni ne facile povas aĉeti la librojn, ĉar ili ne estas disponeblaj facile; ĉar oni malmulte aĉetas ilin, oni malfacile povas intensigi la disponigadon de la varo. Krome, por brazilanoj libroj el Eŭropo estas iom tro multekostaj.

5. La plej grava punkto, pri kiu ĉiuj debatintoj konsentis: por intensigi la aĉetadon kaj legadon de libroj en Esperanto, necesas urĝe plibonigi la lingvonivelon de la esperantistaro. Por tio estus tre bonvenaj facillingvaj tekstoj. Sed ĉefe gravas, ke la esperantistoj mem decidu, ke ili ne estu eternaj komentantoj.

6. Oni menciis la fakton, ke ne ĉiam Esperantaj eldonejoj publikigas librojn, kiujn la plej multaj esperantistoj deziras legi. Estus interese esplori pri la tipo de literaturo, kiu plej ofte plaĉas al Esperanta publiko.

7. Fine, oni aludis la eblecon pri novteknologiaj libroj: sonlibroj kaj libroj legeblaj per porteblaj komputiletoj.

Paulo Sérgio Viana

Esperanto en lernejoj



En la pedagogia retejo www.edukadone.net estas lanĉita nova sekcio *Esperanto en lernejoj* kun la celo krei retan datenbazon pri la lernejaj oficialaj Esperanto-kursoj, kiuj laŭ diversaj leĝoj kaj reguloj eniris la landan instrusistemon.

La ekzisto de tia listo povas helpi al la lernejoj ekkoni unu la alian, kontaktiĝi kaj interŝanĝi spertojn, kio tute certe altigos la nivelon kaj plifortigas la motivojn de la lernado de la internacia lingvo. La listo povas helpi ankaŭ por inform- kaj varboceloj, pruvante la disvastiĝecon de Esperanto. (Por trovi diversajn lernejojn, bonvolu uzi en la retpaĝo la maldekstre troviĝantajn serĉkriteriojn.)

Je 16 okt 2008 en la datumbazo estis 70 lernejoj el 26 landoj kun entute 1782 lernantoj.

Plej multaj lernejoj kun instruado de Esperanto estas registritaj en Pollando — 10. Sekvas en la listo Francio, Germanio, Hungario (po 6); Britio, Litovio, Usono (po 4); Brazilo, Ĉeĥio, Italio (po 3) kaj pluraj landoj en kiuj estas unu aŭ du lernejoj, en kiuj oni instruas Esperanton.



E@I prezentas...

E@I (www.ikso.net) estas internacia junulara organizo, aganta por kaj per Esperanto tra la mondo. Ekde ĉi tiu *Ondo* ni ĉiumonate prezentos al vi niajn projektojn. E@I bonvenigas ĉiujn al uzado de niaj projektoj, aŭ eĉ ĉe aktiva kontribuo, kunlaboro.

Ĝis la ... en la reto.

Peter Baláž, E@I-kunordiganto

Wikipedio por vi

La esperantlingva Wikipedio estas la unua vera, universala enciklopedio en Esperanto. E@I jam antaŭ kelkaj jaroj komencis agadi por antaŭenigi tiun ĉi retan projekton.

E@I provas instigi homojn kunlabori al Wikipedio per pluraj manieroj: verkado de artikoloj, eldonado de (man)libroj, prelegado kaj trejnado.

La unua seminarieto pri Wikipedio okazis en aprilo 2006 dum la renkontiĝo PSI en Germanio. Poste okazis interalie prelegoj kaj trejnado en februaro 2007 en Slovakio, dum la 100-jariĝo de la antverpena klubo *La Verda Stelo* en majo 2007, dum Malferma Tago de UEA en junio 2007 kaj dum Baltiaj Esperanto-Tagoj en Litovio en julio 2007.

Kunlabore kun Pavla Dvořáková en aprilo 2008 okazis trejnseminario en Písek, Ĉeĥio kaj dum la UK en Roterdamo vikipediistoj havis entute tri aranĝojn, kaj ĉiu kongresano havis informilon en sia kongressako. Ties eldonon subtenis UEA, EEU kaj E@I.

Kadre de Konferenco pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko en Dobřichovice apud Prago okazos en novembro ĉi-jare i.a. trejnseminario pri Wikipedio. Krom ĝenerala enkonduka prelego estos traktata kiel la ĉeftemo “Problemario de fakaj artikoloj en esperantlingva Wikipedio” (teoria prezento kun praktika ekzercado — memstara enretigado de antaŭe preparitaj fakaj artikoletoj). Gvidas Pavla Dvořáková, Miroslav Malovec kaj E@I-estrarano Yves Nevelsteen.

En marto 2007 aperis la unua verko de E@I pri Wikipedio: *Manlibro pri Wikipedio*. Kvankam presita en mil ekzempleroj, jam en julio 2008 ĝi elĉerpiĝis.

Dum KAEST E@I prezentos novan verkon de Ziko van Dijk pri Wikipedio: *Wikipedio por vi*. Temas pri 60-paĝa verko, kiu klarigas la fenomenon Wikipedio. En ĝi vi trovos multajn konsilojn kaj klarigojn. La verko paŝon post paŝo gvidas leganton iĝi facile ne nur uzanto de tiu reta enciklopedio, sed ankaŭ ĝia aktiva kontribuanto.

Kvankam kunlabori al Wikipedio estas relative facile, interesitoj ĉefe komence havas multajn demandojn kaj hezitas kontribui. Tial E@I kreis teamon de tiel nomataj “vikipediaj asistantoj”. Temas pri spertuloj pri Wikipedio, kiuj pretas helpi vin diversmaniere. Informojn vi trovos en la nova retejo www.wikipedia.net

Yves Nevelsteen, E@I-estrarano

RADIO		Radio Esperanto
ESPERANTO		<i>Halina kaj Aleksander parolas el Kaliningrado</i>
		Podkasta servo de <i>La Ondo</i>
		Aŭskultu: http://la-ondo.rpod.ru

Paĝoj el la historio de la Sukcena Lando (12)

de Halina Gorecka

Reĝo-filozofo

En 1740 post la morto de Frederiko-Vilhelmo I la tronon heredis lia filo Frederiko II (1712–1786), kiu sukcesis uzi la hereditan potencon kun rafinita makiavelismo por garantii al sia lando la hegemonan rolon en Germanio.

Esence gravas ne tio, ke li estis adepto de milito, kiu estis por li nur politika ilo, sed ke li ĉiam efektivigis “kabine-tajn militojn” kun limigitaj rimedoj kaj celoj, sen pasio kaj sen malamo, racie kontrolante siajn eblojn. Li estis sendube la plej elstara realpolitikisto. Tiu ĉi dando, saturita per la franca kulturo, “malagrabla fizionomio”, kiel epiteto lin lia patro, homo, kiu kuraĝis preferi muzikon kaj filozofion al biero kaj tabako, post multaj jaroj de interna protesto kontraŭ la patra reĝimo, montris sin la plej metoda kaj plej konscienca el Hohencollern-oj. Amiko de Voltero, fantaziema kreanto de Sanssouci, li ekregis siajn regatojn kun pasio kaj lerto. Per du militoj li sukcesis konservi konkeritan Silezion, la plej riĉan provincon de Aŭstrio. Li partoprenis en la unua disdivido de Pollando, kio ebligis al li kompakte kunigi siajn orientajn provincojn.

En la interna politiko Frederiko II daŭrigis klopodojn de siaj antaŭuloj pri koloniado de la teritorioj. Li ne plu atendis bonŝancajn eksterajn cirkonstancojn, sed organizis laŭplanan migradon. Specialaj agentoj varbis en eŭropaj landoj kolonianojn, kiuj estis distribuataj inter la provincoj novaj kaj malnovaj. Koloniigo iĝis aparta branĉo de la pruslanda administrado, kiel kolektado de impostoj kaj rekrutigo.

Frederiko II ne havis apartan ŝaton por sia orienta provinco. Oni scias nur pri tri liaj vizitoj al la Orienta Prusujo. Li dediĉis al ĝi tiom da atento, kiom necesis por apogi tie la reĝan potencon. Sojle de la milita kaj politika katastrofo de la Sepjara milito (1756–1763), li eĉ pretis rezigni pri la Prusa provinco favore al alia teritorio. Tion klarigas la prioritatoj de la politiko, kiun efektivigis Frederiko II dum sia regado. Posedaĵoj de la pruslanda reĝo estis dissemataj tra tuta Germanio, kaj la Prusa provinco estis tute izolita de la Germana imperio. Antaŭ Frederiko estis strategia celo akiri novajn teritoriojn, kiuj devus transformi Pruslandon en unuecan (teritorie)

ŝtaton. Tial ne mirigas lia eldiro, ke “el ĉiuj eŭropaj provincoj por ni ne estas pli taŭgaj ol Saksujo, pola Prusujo kaj sveda Pomerio”.



La Sepjara milito

En la du sileziaj militoj (1740–1742, 1744–1745) Pruslando akumulis rimedojn por kontraŭstari al la gravaj eŭropaj potencoj. Dank’ al la akiro de Silezio la loĝantaro de la reĝlando kreskis je duono, la enspezoj — je triono.

En Eŭropo ŝanĝiĝis la tradicia sistemo de militaj-politikaj unioj, kion oni eĉ nomis “diplomacia revolucio”. Formiĝis novaj aliancoj. Aŭstrio, Francio, Ruslando, Hispanio, Saksujo, Svedio, unuflanke; kaj Britio (kun Hanovro), Pruslando kaj Portugalio, aliflanke.

La militon provokis akriĝo de batalado inter Britio kaj Francio por transoceanaj kolonioj (temo ekster nia rakonto) kaj kunpuŝigo de la pruslanda politiko kun la interesoj de Aŭstrio, Francio kaj Ruslando. Alianco de “la tri virinaĉoj”, kiel sarkasme epiteto ĝin Frederiko II, ne havis unuecan planon kaj tio savis lin. Venkon de la pruslanda armeo en 1757 ĉe Rossbach kaj Leuthen nenigis la venko de la aŭstria-ruslanda armeo ĉe Kunersdorf (1759). Pli frue, en januaro 1758 ruslanda armeno venis en Kenigsbergon, kiu dum kvar jaroj estis administrata de Ruslando.

En 1761 Pruslando estis rande de katastrofo, sed la situacio ŝanĝiĝis unumomente, kiam post la morto de ruslanda imperiestrino Elizabeto II (25 dec 1761) la tronon okupis Petro III, granda

adoranto de Frederiko II. Li packontraktis en 1762 kun la pruslanda reĝo kaj eĉ disponigis al li ruslandan korpuson. Post la faligo de Petro III, Katerina II nuligis la kontrakton, sed ne rekomencis la militon. Sen la ruslanda helpo Aŭstrio kaj Francio ne daŭrigis la militon. Laŭ la packontrakto kun Aŭstrio kaj Saksujo Pruslando ricevis Silezion.

Pruslando ekpretendis la rangon de grandregno, kvankam ĝia aneksemo ricevis rebaton. Rusa historiisto Sergej Solovjov skribis eĉ pri “militotimo” de Frederiko II, kiu preferis vastigi Pruslandon per saĝo kaj ruzo, anstataŭ glavo.

Post la milito la ekonomio de Pruslando ruiniĝis, kaj la reĝo unuavice zorgis pri restarigo de la mastrumado. Kampuloj povis forlasi la armeon. Provincoj damaĝitaj dum la milito ne pagis la impostojn, Silezio dum ses monatoj, Pomerio dum du jaroj. La ŝtato disponigis grandajn sumojn por refunkciigi fabrikojn. Estis altigitaj impostoj por luksaĵoj enportataj el eksterlando, interalie, por kafo. Ĝuste tiun periodon karakterizas grandioza konstruado en Berlino kaj Potsdamo.

La unua divido de Pollando

En la 18a jc Pollando krizis ekonomie kaj politike. La najbaraj ŝtatoj — Aŭstrio, Pruslando kaj Ruslando — pli kaj pli ofte enmiksiĝis en la internajn aferojn malhelpante politikajn reformojn. En 1772 la tri ŝtatoj malkaŝe agesis kontraŭ Pollando kaj dividis parton de ĝia teritorio. Aŭstrio ricevis Galicion, Ruslando — orientan Belarusion kaj la polan parton de Livonio. La akiron de Pruslando ni prezentu pli detale: Varmio (aligita al Orienta Prusujo), Marienburga, Ĥelma kaj Pomoria vojevodioj kaj parto de Grandpolujo (la teritorio ricevis la nomon Okcidenta Prusujo). Ĝuste post tio ĉi komenciĝis amika korespondado de Frederiko II kun Katerina II.

La lastaj vivojaroj

Komence de la 1780aj jaroj Frederiko II kun la unuarangaj juristoj ellaboris novajn leĝojn, i.a. Ĝeneralan civilan justicon. Li multe verkis. Pasigante siajn tagojn en laboro, konstante ĉirkaŭita de homoj, li restis soleca. Liaj amikoj kaj kunbatalantoj mortis. Oni atribuas al li la frazon: “Mi iĝis historio de mi mem”. Iom post iom la fortoj forlasis Frederikon II, kaj li mortis nokte 16/17 aŭg 1786.

Lia testamento pri la enterigo en lia ŝatata Sanssouci estis efektivigita nur 205 jarojn poste, 17 aŭg 1991.

Daŭrigota

Esperanto en perspektivo

Temas pri unu el la ĉefaj libroj en Esperanto, kiu detale pritraktas la historion de la Esperanto-movado ĝis la komenco de la 1970aj jaroj.

Ĝi ampleksas 844 paĝojn (kun indekso) kaj aperis en 1974 ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Rotterdam, pli precize ĉe Centro de esploro kaj dokumentado pri la monda lingvo-problemo (CED).

La verko estis iniciatita de la tiama UEA-prezidanto kaj CED-direktoro Ivo Lapenna (1909–1987), kiu pensis pri pliampleksigo de sia konciza manlibro *La internacia lingvo* el 1954. Fine de la 1960aj jaroj estis planoj ankaŭ pri nova *Enciklopedio de Esperanto*. Ambaŭ ideoj eniris la koncepton de EeP. En la antaŭparolo Lapenna menciis, ke la libro estis frukto de propono kolekti ĉiujn faktojn pri UEA, kiam en 1954 ĝi estis proponita por ricevi la Nobel-premion pri paco.

La verkego konsistas el ses ĉefaj partoj.

La unua parto temas pri Esperanto kiel Solvo de la Lingva Demando en Mondaj Kadroj, la dua parto traktas la literaturon, la tria parto portas la titolon “En Servo de Kulturaj Interŝanĝoj, Praktikaj Celoj kaj Internacia Solidareco”, la kvara parto enhavas la Historion kaj Nuntempan Organizon de la Esperanto-Movado, la kvina parto estas dediĉita al la Atakoj kaj Apogoj, kaj la lasta sesa parto analizas Perspektivojn por la Estonteco.

Kiel ĉefredaktoro Lapenna verkis grandparton de la pluraŭtora monografio, nome ĉapitrojn, kiuj unuavice koncernas la Esperanto-movadon:

Ĉapitroj 1, 2, 4 kun konciza historia trarigardo, pri la aktuala situacio, pri faktoroj influantaj la lingvo-evoluon kaj la instruadon de Esperanto. En ĉapitroj 11–13 li verkis pri formoj de kulturaj aplikoj (belartaj, oratoraj konkursoj, teatro ktp.), pri uzo por praktikaj celoj (delegita reto, radio, turismo ktp.) kaj pri instrumento de internacia komprenigo (ekz. universalaj kongresoj). Ĉapitro 18 estas dediĉita al la konstruado de moderna UEA (1948–1973). En ĉapitro 20 li prezentis diversajn Esperanto-instituciojn. Kaj li transprenis ankaŭ ĉapitrojn 22 kaj 23 por trakti la demandojn de komuna lingvo antaŭ internaciaj institucioj kaj esencaj antaŭkondiĉoj por rapidigi la progreson de Esperanto.



Al Tazio Carlevaro (1945–), tiam apenaŭ 30-jara talenta esperantologo/interlingvisto, estis konfeditaj ĉapitroj 3 kaj 5–10 pri la Esperanta kulturo, Esperanta literaturo (originala kaj traduka beletro, scienca kaj faka literaturo), fakaj terminaroj kaj periodaĵoj. Li ankaŭ pretigis la indekson kunlabore kun Henri Vatré.

La tria kunverkanto, Ulrich Lins (1943–), bone konata en la Esperanto-movado kiel ĝia eminenta historiisto, ricevis la taskon kontribui en ĉapitroj 14–17 pri la komencoj de la organizita Esperanto-movado (unua UK, UEA, Ido-skismo), inter 1908 kaj 1947. Krome Lins prilaboris la vastan ĉapitron pri landaj kaj fakaj Esperanto-organizaĵoj kaj pri TEJO. En ĉapitro 19 estas prezentita la laborista Esperanto-movado, kaj en ĉapitro 20 li aldonis la artikolojn pri Akademio de Esperanto, muzeoj kaj bibliotekoj.

En ĉapitro 21 Lins prezentis siajn studojn pri la persekutoj kontraŭ esperantistoj, precipe en nacisocialista Germanio kaj komunista Sovetunio. Tio estis tre tikla temo, ĉar en tiu tempo ne eblis publike paroli pri la stalinismaj krimoj en la orienta bloko, kaj tamen la ĉefan libron en Esperanto devis ricevi ankaŭ la esperantistoj en la mallibera mondo. Sed la historio de la movada organizado ĝis la dua mondmilito pleniĝis longtempan mankon, kaj kiel konate poste aperis aparta libro de Lins *La danĝera lingvo*.

Kiam en Sovetunio kaj en Orienta Eŭropo oni eksciis, ke en EeP aperos ĉi-tema ĉapitro de Ulrich Lins, oni ege ekscitiĝis, eĉ en partiaj medioj. Laŭ postulo de la Konsiliĝa renkontiĝo de

gvidantoj de socialismaj Esperanto-organizaĵoj, Nikola Aleksiev oficiale protestis ĉe UEA, postulante nepublikigon de tiu materialo, sed tio jam ne plu efikis.

Victor Sadler, la direktoro de la Centra Oficejo de UEA, estis la teknika redaktoro de la libro kaj rilatis kun la presejo. Simo Milojević, la redaktoro de *Esperanto*, okupiĝis pri la aranĝado de ilustraĵoj en la verko; por iomete krei ekvilibron al Lapenna, kiu foje malmulte aŭ tute ne menciis neŝataton, la ruzulo ankaŭ mem decidis pri elekto de prezentindaj personoj. Ankaŭ multaj aliaj homoj iel kontribuetis al la verko.


Pro deziro de Lapenna pliampleksigi ion, aldoni pliajn ĉapitrojn, reverki ion, la libro ne fariĝis preta en 1972, kvankam oficiale ĝi estis finredaktita la 30an de junio de tiu jaro. Iuj ĉapitroj estis finitaj en 1973, kaj nur en 1974 la verko pretis por la eldonado kaj aperis post la Hamburgo UK.

EeP estis vendosukceso malgraŭ “spirhaltiga” (laŭ Benczik) prezo (70 guldenoj) kaj estis elvendita proksimume en 1987. Do ĝi jam delonge estas elĉerpita kaj tre malfacile akirebla, des pli ke dua eldono ne estis produktita, eĉ ne pirata (kiel ĉe PIV). Fakte ekzistis la ideo plulabori kadre de nova eldono de la *Enciklopedio de Esperanto*. Sed ŝajnas, ke oni cedis favore al la ideo, kiu komencas esti realigita kadre de Vikipedio.

Recenzoj pri EeP aperis en *Esperanto* (UEA) 2/1975, *Heroldo de Esperanto* 7/1975, *Literatura Foiro* 31-32/1975, *Interlingvistika Informa Servo* 1/1975, *LPLP* 3/1979, *Horizonto* 28, *La Espero* 2/1975, *Hungara Vivo* 3/1975, *der esperantist* 70/1975, *GDR-Paco* 1975, *La Pacaktivulo* 103/1975, *Sennaciulo* 7/1975, *Boletín* 72/1975, *Starto* 2/75, *Bulgara Esperantisto* 38/1975, *La Brita Esperantisto* sept/75. Kritikata estis, ekzemple, la multloke troa patosa retoriko de Lapenna, la evidente misproportia prezento de iuj temoj kaj liaj eventualaj mistakoj de gravaj demandoj. Anstataŭ precizaj fontindikoj, aperis nur bibliografioj fine de la ĉapitroj.

Ĉiukaze, la jaro 1974 fariĝis por Lapenna ankaŭ kulmina pro la fakto, ke finiĝis lia influo en UEA. Dum la 59a Universala Kongreso en Hamburgo li publike eksciis el ĉiuj siaj funkcioj en UEA, post kiam li konstatis, ke li perdis la plimulton en la UEA-komitato. Ankaŭ la orienteŭropanoj ne plu volis apogi lin.

Andreas Künzli



La ordiganta

de Trevor Steele

Ĉu eblas, ke somere suno brilas tie ĉi? Ĉi-momente nekredeble. Facilas kredi, ke ostofrostiga vento eterne hurladas kaj ĵetadas hajlon kaj neĝerojn sur la blankan teron, la mallumajn arbojn, kaj la kaŭrantajn domojn. La “hotelo”, kie mi gastis, estas nur kaduka ĉambretaro, kiu neniam pretendis voli gastigi homojn. Bonŝance, ke mi havis por legi kaj skribi: tio helpis min provi ignori la penetran malvarmon.

Entute ne pli ol dudek dometoj kaj kelkaj butikoj, al kiuj mankas ne nur la koloroj, kiuj altiru klientojn, sed ankaŭ grandparte varoj. Kial homoj iam decidis vivi ĉi tie? La respondo troviĝas en tiu domo, al kiu mi nun direktas la paŝojn, la stacidomo, la sola iom varmaspekta loko en la tuta ĉirkaŭaĵo. Jes, homoj estas ĉi tie, ĉar la fervojo ebligas iri aliloken, al la urboj, kie estas aliaj homoj, eventuale manĝaĵoj kaj trinkaĵoj — sed tio ne certas nuntempe — kaj distraĵoj, kaj antaŭ ĉio varmo.

Dum mi puŝas min kontraŭ tiu glacia vento kaj alstrebas la stacidomon, mi min demandas, ĉu la sombre trista pejzaĝo ne iel spegulas la situacion de la tuta giganta disfalanta imperio. Antaŭ ses jaroj la homoj subite ricevis permeson diri, kion ili vere pensas, kaj ili ne devis plu timi gvatantajn spionojn ĉe ĉiu angulo: la koncentrejoj unu post alia fermiĝis. La potenculoj kalkulis, ke per tio ili gajnos la apogon de la popolo, ke la imperio ekzistos pro la apogo de la civitanoj, ne nur pro timo kaj devigo. Kaj la rezulto: miliojn da laŭte malkontentaj homoj, ekonomia kolapso, kaj universala sento, ke io devas okazi. La potenculoj mem ne plu scias, ĉu provi savi la imperion

per tradiciaj metodoj — tribunaloj kaj vastaj punejoj — aŭ ĉu provi resti ĉe la avangardo de reformo; ĉu forŝlosi la tigran en kaĝon aŭ ĉu rajdi sur ĝia baŭmanta dorso. La manko de decidopovo supre kaj la dividoj inter la ĉefoj mem pensigas, ke baldaŭ la strukturoj de jardekoj brue malintegriĝos. Sed kio sekvos?

Malpli politikaj pensoj ekkaptas min dum la lastaj metroj antaŭ la knaranta pordo de la stacidomo: mi sentas, kiel sennombraj homoj en tiu ĉi regiono sentis dum jarmiloj, kiam ili eniris varmigitan lokon, kie la vento ne plu regis. Danke mi aŭdas la klakon malantaŭ mi, kiu tuj ŝanĝas mian etan mondon. Ĉi tie estas malhela lumo — sed tamen lumo — estas homoj kaj varmo, kaj mi povas provizore forgesi la eksteran regnon de la dioj de malvarmo kaj ventoj.

La ĉambro tre similas milionojn da aliaj en la landego: senornama, la farbo de antaŭ pluraj jardekoj preskaŭ tute foriĝis kaj ĉesis provi igi la lokon pli homamika. Ĉar ni ĉiuj — probable ni nombras dudek — venis el la malvarmo, ni ĉiuj kuntrenis striojn da degelanta glacio kaj koto, kaj do la betona planko estas multloke brune malseka. La muroj estas malpuraj, kaj probable estis tiaj dum jardekoj: neniu amis ilin sufiĉe por doni senpagan tempon al ili, kaj ne estis mono por pagi iun. Ie kaj tie iu skribaĉis kontraŭreĝiman sloganon, kaj neniu havis sufiĉe da energio por tute forigi la impertinentaĵojn. Ŝajnas, ke iu duonkore provis nur mallegebligigi la kernvortojn.

La biletvendisto en sia giĉeto estas mishumora, sed mi havas monon kaj li ne havas validan pretekston por rifuzi

vendi al mi. Jen do mi havas tiun sli-paĉon, kiu garantias la rajton sidi en malpura trajno ĝis mi atingos la ĉefurbon.

Mi trovas benkon. Ni devos atendi ankoraŭ unu horon aŭ, laŭ miaj ĝisnuna spertoj, eble tri. Kun mia kutima scivolo mi turnas mian atenton al miaj kunpasaĝeroj. Surprize, ke tiom da homoj entrajniĝos; ni ŝajnas tro. Ĉu duono de la loĝantaro veturos? Miaj okuloj ekdubas, ĉu temas pri lokaj homoj. La vestoj kaj la aspekto de la homoj tro varias. Kelkaj estas palaj eŭropanoj, aliaj evidente devenas el landoj, kie la suno brunigas la vizaĝon. Kelkaj estas altkreskaj, aliaj havas mallongajn mongolajn kruojn, kiuj eble iam alkroĉiĝis al batalĉevaloj. La vestoj ne tre varias: ĉiuj celas varmigi kaj fajfas pri parizaj kaj novjorkaj modoj. Unu el la viroj tamen elstaras tiurilate: lia mantelo estas brile nigra, liaj botoj same, la ŝalo estas griza sed el multekosta ŝtofo. Kion mafiano faras en tiu ĉi mizera vilaĝo? Nu, mi ne tro haste juĝu: eble lia bonstato rilatas al honesta laboro. Jes, sed kia?

Kial la homoj sidas tiel silente krom tio, ke grupo da ili preskaŭ senvorte rondirigas botelon da vodko? Ĉu la etoso de la vilaĝo prirabas nin de la parolkapablo? Ĵus mi ekvidis, ke kelkaj dormas, kvankam dormi sur la kurdaj lignaj benkoj eblus nur, se oni estus ĝismorte laca. Miaj okuloj saltas de unu vizaĝo al alia: ĉu tiuj esprimoj de enuado aŭ malbonhumoro estas kutimaj? Lipoj tiriĝas flanke suben, okuloj vitrecaj fiksiĝas pri eventuale pli bona estontaĵo, kiu verŝajne ne venos. Neniu ŝajnas ĝui la vivon, neniu sentas deziron aŭ bezonon eliri

el la propra dikveste ĉirkaŭata korpo kaj komuniki al aliaj.

Se mi pli bone konus la lingvon kaj se la homoj nun ĉirkaŭ mi ŝajnus pretaj paroli, mi certe provus akiri biografietojn de pluraj el ili. Sed mi, skribemulo el fora lando, estas fremdulo inter la silentemaj homoj, kaj ŝajnas, ke mi devos min distri per mialingva romano en mia paltopoŝo. De tempo al tempo la ekstera vento tiel forte frapas ĉe la netravedeblaj fenestroj, ke ni devas agnoski ĝian ankoraŭan ekziston, sed ni estas imunaj al ĝi en nia malbela sed varma rifuĝejo.

Mi elprenas la romanon, sed ne havas ŝancon ĝin malfermi. La pordo estas subite ĵetmalfermita, la hurlanta vento dumsekunde trudas sin al ni, sed mia atento direktiĝas nur al la homo, kiu eniras. Li estas certe pli ol dumetra viro kun tre larĝaj ŝultroj. Kiam li marŝas, li vigle pumpas per la longegaj brakoj kaj alte levas la genuojn tiel, ke liaj paŝoj estis duoble tiel longaj, kiel tiuj de normalstatura virino. Entute militista aperaĵo. Komprenable tiu impresio estas emfazata de la malhelverda kaskedo, kiu ankoraŭ grandparte kaŝas lian vizaĝon, de la malhelverda uniformmantelo kaj de la nigraj rajdbotoj, kiuj bezonas du-tri paŝojn en la ĉambron, antaŭe ol ili komencas diŝjeti sian ŝarĝon de neĝo. Ja, li estas klare ia oficiro, ĉu de la armeo, ĉu de sekreta polico, mi ne scias.

La oficiro stamfas kaj lasas makuolojn de malpura neĝo sur la betono. Li malbutonas sian mantelon, kaj ni ĉiuj silente rigardas lian samkoloran uniformon kaj la brile nigran talizonon, al kiu kroĉiĝas pistolujo. Li demetas la kaskedon, kaj fine ni vidas lian longan, iom maldikan vizaĝon, lian akcipitran nazon, kaj liajn ruĝajn okulojn, per kiuj li rapide rigardas nin ĉiujn.

— Biletojn montru! — li bojas sen eĉ malĝentila klarigo.

Tiuj malafablaj vortoj subite malfermas al mi lian vivkronikon. Li estas fizike impona viro, sendube tre bona ĉe diversaj sportoj, rezoluta kaj ambicia, li devus povi grimpi ĝis tute alte en la hierarkio, sed la epoletoj perfidas, ke fakte lia rango estas modesta. Mi vidas, ke li ne kapablas regi sian koleron, ne scias flati superulojn: tion li rigardas karakterforto sed samtempe

obstaklo al lia ambicio, li vidas en si specon de martiro pro honesteco, dum rivaloj en la sama uniformo, al kiuj mankas liaj principoj, promociiĝas malantaŭ lia dorso.

Mi decidas fari el tiu eble danĝera oficiro dumtempan konversacipartneron. Mi leĝere videbligas mian pasporton de fremda kaj neignorebla lando kaj diras, konscia, ke mia alilanda akĉento donas specon de kortegklaŭna licenco:

— Kial ni devas montri bileton?

Li turnas sian atenton al mi, okule esploras min — kaj jes, li ja vidas mian pasporton — kaj decidas doni ian klarigon:

— Ni vivas en lando, kie regas ordo, kaj estas malpermesite restadi en stacidomo sen bileto!

Mi plene ekspluatas mian licencon:

— Sed kiel ĝenus iun ajn, se mi estus tie ĉi sen bileto?

Li alpaŝas min kaj evidente li ŝatus trovi kialon por elĵeti min:

— Montru vian bileton!

Kiel eble plej leĝere mi montras ĝin. Li krude eltiras ĝin el miaj manoj kaj provas trovi ian difekton en ĝi. Li senvorte redonas la paperaĉon, kaj krias:

— Ĉiuj montru bileton!

Li iras laŭvice al ĉiu kaj ŝajnas malkontenta, ke la biletoj validas. Preskaŭ la lasta en la vico estas malgranda homo ankoraŭ dormanta sur benko. La oficiro puŝas lin per la boto-pinto kaj krias tre laŭte:

— Bileto!

La vekito — kaj tuj mi konstatas, ke fakte li nur ŝajnis dormi — estas brunvizaĝa etulo el lando, kie kutime brilas suno, el popolo, kiu malvolonte apartenas al la vasta imperio, kaj li estas sendube ano de religio fremda al la palvizaĝuloj en la malgaja ĉambro. Kial li estas en tiu ĉi nesteto, mi ne povas imagi, sed lia kulposenta rideto kaj servilaj gestoj igas klare, ke li ne havas bileton kaj probable ne monon por aĉeti ĝin. La sudulo ekstaras kaj treme manserĉas ion en sia malpura mantelo, eltiras boteleton, kaj provas proponi ĝin al la minaca sinjoro, murmurante vortojn en iu nekonata lingvo kaj ridetante.

La grandstatura uniformulo snufegas. Ke oni provu subaĉeti lin per tia mizera vodkobotelo trikvarone malplena, ha! Li ripetas sian minacon,

ĉi-foje malpli abrupte, ĉar li scias jam la respondon:

— Bileto?

— Sinjoro oficiro...

Tiom mi komprenas, sed la ceteraj vortoj estas kompreneblaj al neniu el ni. La rideto de la malgrandulo ekskuiĝas, liaj lipoj apenaŭ plu kunludas en la rolo de komplezpropona viktimo de cirkonstancoj.

Lastan fojon, kaj preskaŭ flustrate, venas la vorto "Bileto?" Kaj la brunvizaĝulo gestas senhelpe.

Per subita salto, kiu pruvas, kia bona basketbalisto li estus, la oficiro neniigas la spacon inter si kaj la senbiletulo, ekkaptas lin je la mantelkolo, levas lin alten, lasas lin fali betonen, turnas lin, ke li kiel eble plej forte trafu per la boto la postaĵon, refoje kaptas lin, ke li ne forkuru, ree botfrapas lin, puŝas lin en la direkton de la pordo, sed akompanas la moviĝon al la pordo per serio da plenfortaj batoj aŭ per la boto aŭ per la genuo. La etstatura homo povas nur krie peti kompaton per sia nekomprenebla lingvo, sed ne helpus, eĉ se li kapablas belege paroli la imperian lingvon. Ĉe la pordo la oficiro devas dumsekunde interrompi sian punlaboron por malfermi. Per vere impona muskolstreĉo li levas la tutan korpon de la senbiletulo kaj ĵetegas lin en la eksteran neĝon kaj albojas vorton, kiun mi ne kaptas, sed ĝi certe substrekas la fakton, ke kelkaj homoj havas potencon super aliaj. La malgrandulo dume ekkrias. Bonŝance li ne rompis kruron, ĉar la oficiro braksvinge minacas lin, se li ne foriros de la stacidomo. Ni vidas nenion, sed evidente la vireto kapablas retreti. Eble nur brako aŭ pojno estas rompita, sed mi esperas, ke la neĝo sufiĉe moligis lian falon por tion eviti.

La oficiro revenas en la ĉambron, kaj la ankoraŭ ne kontrolitaj nervoze montras sian bileton. Li apenaŭ kontrolas. Ŝajnas, ke li jam atingis sian celon. Post nelonge li surmetas sian kaskedon, ĵetas malŝatrigardon al ni ĉiuj, kaj eliras. Sendube li devigis obeon al la leĝoj de la imperio. Ordo regas.

Eĉ tiu incidento ne provokas komentojn inter miaj kunpasaĝeroj. Eble ili kutimas al tiaj scenoj.

Do mi provas koncentriĝi pri la romano. Sed daŭre interrompas mian ĝuon la demando, kie la elĵetito dormos, kie li pasigos la nokton?

Libro neordinara

De Kock, Edwin. *Sub fremdaj ĉieloj* / Antaŭparolo de Arno Kucharzik. — Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2007. — 286 pĝ. — (Serio Stafeto; №32).

La poeton Edwin de Kock mi konas jam ekde niaj komencaj jaroj kiel poetoj en Esperanto. Ni estis korespond-amikoj, interŝanĝis personajn informojn, sed precipe pensojn, komentojn, instigojn koncerne nian poezian verkadon. Estis bela, ankoraŭ sopirata tempo de samaĝaj samcelanoj, simile izolitaj en preskaŭ antipodaj landoj, li en suda Sud-Afriko, mi en norda Islando.

Kiam aperis lia unua poemplibro, *Ombroj de la kvara dimensio* (1961) mi ĝin recenzis por *Norda Prismo* (1962, №1). Tie mi sen ajna hezito skribis: “Per ĉi tiu libro Edwin de Kock nekon- testeble pruvas, ke li jam apartenas al la frontvico de la malgranda taĉmento de seriozaj Esp. verkistoj”. Tiuj vortoj, skribitaj en flagranta entuziasmo pri la verko de mia amiko, jam antaŭ longe elpruviĝis daŭre kaj plene veraj: per siaj postaj poeziaj verkoj (la nuna estas la deka), Edwin de Kock certigis al si lokon kiel unu el la plej originalaj kaj fekundaj poetoj en Esperanto kaj laŭ mia opinio ankaŭ la plej laŭnature ambicia. Ĉi tion lastan mi volas emfazi, sed ne temas pri ambicio de konkurado kun aliaj, sed pri persona, sana ambicio baze de propraj potencialoj kaj konvinkoj. El tia ambicio fontas ekzemple lia vastkoncepta eposo *La konflikto de la epokoj*.

La nova libro de Edwin de Kock, *Sub fremdaj ĉieloj*, konsistas el 51 poemoj, plej multaj verkita ekde 1995 post lia translokiĝo al Usono dum 1994, kaj el kvin prozaj verkoj (krom Antaŭparolo de lia amiko Arno Kucharzik) sub la komuna titolo *Pri kaj ĉirkaŭ Edwin de Kock*. La prozo okupas 174 paĝojn de la libro, la poemoj 64 paĝojn. La prozaj verkoj, kiel indikas la komuna titolo, enhavas kaj biografiajn tekstojn de la poeto mem kaj verkaĵojn de homoj, kiuj intime konas Edwin kaj havas multon por diri pri tiu eksterordinara homo. Oni do tuj konstatas, ke temas pri libro neordinara, efektive unika en Esperanto en tiu senco, ke ĝi enhavas kvazaŭ “testamenton” de poeto, kiu prave opinias, ke por plena kompreno de lia originala verkaro necesas raporti laŭeble komplete pri lia vivo, liaj cirkonstancoj, liaj konfliktoj, liaj kredoj kaj konvinkoj. Tial la membiografiaj partoj de la libro estas



aparte bonvenaj kaj multon kontribuas al kompreniĝo pri Edwin de Kock kiel homo kaj poeto.

La 12-an de novembro 1967 Edwin skribis jubile sur la frontan paĝon de sia ĵus eldonita poemaro *Fajro sur mia lango*, donace sendita al mi: “Ĉi tiu estas la unua volumo, kies paĝsuprojn mi scivoleme kaj entuziasme malferme tranĉis kaj kiun mi karese-dorlote legadis en la freŝo de mia kontento kaj fiero”. En la lasta poemo de *Sub fremdaj ĉieloj*, “Adiaŭ al la memo”, la poeto rigardas sian poezion kiel sian duan memon, kiu pretervivis la morton de la alia memo, lia persona, vivanta korpo: “Nu, certe, la tenebron / evitos l’ alia mem’ en kiun mi / dum kvindek jaroj transvortigis min”. Supozeble, tiaj sentoj estas komunaj al ĉiu serioza poeto. Tamen, la poezia kariero de Edwin de Kock ne ĉiam iris sur vojo sendorna. Nelonge post la aperigo de liaj fruaj poemoj li eĉ serioze pensis forlasi verkadon en Esperanto kaj ja dum kelka periodo multe verkis poemojn en la Afrikansa. “Ĉi tio rekte rezultis el etmensa kritiko kontraŭ miaj fruaj poemoj en Esperanto, precipe pro metriko kaj aliaĵoj ne akceptindaj al niaj karaj Parnasanoj” (pĝ. 179). Li aparte citas Kalocsay, ke mi “ne povas (min) adapti al la versformo kaj ĉiam pekas kontraŭ la versformo”.

Edwin reagis al tiu kritikado per erudiciaj eseoj pri metriko (en *Ombroj de la kvara dimensio* kaj *Fajro sur mia lango*); ankaŭ en la nuna libro oni povas detale legi pri la afero en la eseoj “Aŭtoro superrigardas sian karieron” kaj “Iom pri mi kaj mia verkado”. La

kerna vero kristaliĝas en jenaj vortoj de la poeto: “La ĉefa demando pri tia mik-sado [t.e. de trokeaj kaj jambaj versoj] devus esti ne ĝia malortodokseco aŭ teoria akceptindo, sed ĉu mi sukcesis per ĝi krei poezion validan” (pĝ. 105). Sed tiu kritikado jam antaŭ longe silentiĝis kaj tute forpasis, kritikado, kiun mi ĉiam opiniis ne nur stranga, sed simple naiva kaj miopa. Strikte mezuritaj taktoj laŭ difinitaj versformoj ne ĉiam garantias naturan ritmon de poemo, pli gravas tia disdivido de akcentoj en intima ligo kun signife gravaj vortoj, kia nature kongruas kun voĉa deklamo de poemo.

Kaj ĝuste tion ĉiam celis Edwin de Kock en sia poezio.

Mi jam menciis la poemon “Adiaŭ al la memo”, la lasta poemo en la nuna kolekto. Ĝia temo estas la morto. En *Poemaro kaj prozeraj* (1970) troviĝas poemo pri la sama temo, “Al mortosopiranto”. Tie la poeto priskribas la sombran esencon de la morto per senindulgaj bildoj kaj demandas: “Ĉu vin sufiĉe kontentigos ĉi konsterno, / post tutvivaj neplenumiĝoj / simple forŝvebi en ekstazon de silento?” La poemo estas provo konvinki la alparolaton, ke la vivon indas vivi kaj uzi por plenumi siajn devojn kaj celindaĵojn. En notoj pri “Adiaŭ al la memo” oni legas jenajn vortojn kongruajn al la jam citita demando: “... mi konsideras la aktualan mondon materian grava kaj plene valida”. Tiuj vortoj ja sekvas kiel konsekvenco de la religia kredo de Edwin de Kock pri la individua memo de la homo, kiu rekreiĝas je la reveno de Kristo. Estas tiu memo, kiun adiaŭas la poeto en la poemo — portempe. Nun mi tuj diru, ke kvankam mi ne partoprenas la ideologion — fakte nenian ideologion, ĉu religian, ĉu politikan — de la Adventistoj, mi plene respektas la kredon de Edwin de Kock.

En antaŭparolo de *La konflikto de la epokoj*, Libro I (1984), post priskribo de tri gravaj punktoj “iom gravaj” de la kredo de la Adventistoj, li skribas: “Kontraŭ tio mi tamen devas averti, ke mi estas individuo, kun propra vidpunkto, neniel reduktebla al unu el miaj kategorioj de aparteno”. Li sekve listigas tiujn kategoriojn, tiam aktualajn, entute sep laŭ jena ordo: homo, Kristano, Adventisto, Sud-Afrikano, Afrikanslingvano, Buro, blankulo. Inversigi tiun vicordon igus lin ne homo, sed monstro, li diras. Eble li volus nun iom ŝanĝi tiun liston pro novaj cirkonstancoj, mi ne scias. Sed mi persone emus ĝin simpligi al nur

du “kategorioj”: homo — poeto. Estas almenaŭ klare, ke religio havas tiom gravan funkcion en poezio de Edwin de Kock, ke la emocia naturo de ambaŭ unuigas en granda parto de lia poezia arto.

Mi jam menciis notojn. El la 51 poemoj en *Sub fremdaj ĉieloj* 22 kunhavas notojn. Ĉiuj estas necesaj kaj helpas al kompreno, kiu alie estus mankhava. La notoj estas diversaj, multaj koncernas historiajn eventojn aŭ cirkonstancojn, aliaj rilatigas poemojn al personaj travivaĵoj kaj memoroj, iuj aludas al la religia kredo de la poeto. La bezono de notoj plejparte originas el la multvarieco de temoj. Ankaŭ la poemaj formoj varias, de mallongaj silabnombraj (japaneske stilaj tankaĵoj, koreeske stilaj ŝigoj) ĝis tutpaĝaj poemoj, ofte kun mezlongaj linioj; rimoj estas ne oftaj (tamen ĝenerale en la tankaĵoj) kaj neniam sintrudaj. La poemoj estas datitaj kaj lokitaj, plej multaj estas verkitaj en 2005 kaj 2006 en Edinburgo, Teksaso, kiun Edwin opinias, ke estos “verŝajne” lia “lasta rezidejo”; laste datita (2007.04.12) estas bela tankaĵo pri Ria, unu el pluraj tiaj pri lia kara edzino. Kelkaj poemoj devenas el liaj lastaj jaroj en lia hejmlando Sud-Afriko, iuj el liaj vojaĝoj alilande.

Inter ĉi tiuj estas la plej longa poemo en la libro “Rekviemo por la Albigensoj”, fakte komencita en Francujo, sed finita en Diadone, “farmeto norde de Pretorio, Transvalo”, kie loĝis la familio dum la lastaj dekdu jaroj antaŭ la translokiĝo al Usono. Tiu granda poemo, konsistanta el sep mezlongaj partoj de entute 206 verslinioj, estas dolora meditado pri la krucmilito de la Papo kaj la franca reĝo kontraŭ la herezaj Kataristoj, la Albigensoj, en suda Francio 1209–1229. La poeto komencas per aludo al la epoko de la trobadoroj en tiu regiono:

*Du ambiciojn mi longe kun mi portis
en miaj kofroj al kaj tra Eŭropo:
aŭskulti najtingalon kaj l’ Provencan,
korlingvon foje normigitan — vaste
kantatan — kie la Mezmaro lekas,
dismordetante, la antikvan bordon.*

Sed lia revo ne plenumiĝas, li suferas kvazaŭ inkubon duondorme kaj konscias, ke “nur estis mortigita trobadoro / super liut’ finkurbe kaj sanganta”, ke la lingvo provenca ne plu aktualas; kaj li entreprenas vojaĝon al la lokoj, kie okazis la fifamaj kruelaĵoj kontraŭ la herezaj Albigensoj fare de la katolikaj

armeoj. Liaj doloro kaj indigno estas absolutaj:

*Ĉu estas iu ajn herez’ pli granda
ol ke Kristano trempu siajn fingrojn,
aŭ brakon ĝiskubute, en la sangon
de la gefratoj, nur ĉar alikredaj?*

Li vizitas la Katedralon de Sankta Cecilio en Albio, komencitan kelkajn jardekojn post la masakroj:

*L’ interno proporcie harmonias
laŭ masonaĵoj kaj alteco, malgraŭ
la miskoloro kaj ornamoj kiĉaj.
Sed jen mi pense flaris kiel sango
kun terurŝvito al la nav’ kroĉiĝis,
kaj en ĝin oni trempis ĉiun ŝtonon,
miksante kun ĝi knede la morteron...*

La poeto ne eltenas esti en tiu “kultmasivo”, li sentas sufokiĝon kaj kuras el la konstruaĵo. Li finas la poemon per demando, resendante al sia poezia revo en la komenco:

*Ĉu iam post tenebroj elrigardos,
anstataŭ sepjarcenta opinio
kiu ŝtoniĝis en la kirkon tie,
novaj kasteloj brilaj apud Tarno,
kun kandellumo, damoj kaj kortez’ —
dum en la foje disflorinta lingvo
Provenca ree kantos trobador’?*

Tiu poemo senrezerve meritas lokon inter la plej potencaj poemoj verkitaj en Esperanto pro la disciplina kunagado de indigna emocio kaj rekte konkretaj bildoj.

*Hieraŭnokte
mi en l’ antaŭa lando
memoralmozojn
vidis sur Diadone,
viajn malnovajn rozojn.
(Farmo foje)*

*En la momenton
saltas dista memoro.
Ne, ne, oldulo!
Forpasis tute tiuj
korlando, homoj, horo.
(Noktomeze sendorma)*

Diversaj poemoj, precipe la tankaĵoj, esprimas la nostalgion de la poeto por sia antaŭa hejmlando kaj aparte por la farmo Diadone, la lasta rezidejo de la familio antaŭ la foriro al Ameriko. Tiu nostalgio iel kuniĝas subsente kun la fakto de pliaĝiĝo. Tamen konsiderinda parto de la poemoj en *Sub fremdaj ĉieloj* rekte kongruas kun la titolo, ne nepre rilate al la ĉieloj de lia nova hejmlando, sed al alilandaj ĉieloj, en Koreujo, en Malto, en Ruslando, en Sicilio, impresoj kaj memoroj el liaj vojaĝoj tra la mondo. Ankaŭ meditoj histori-devenaj havas sian lokon en la poemaro: la tombo de Tutankhamen, komandanto van Riebeeck, la Aztekoj ... efektive, la temara areno similas al tereno kie kreskas plej diversaj plantoj nature kondiĉitaj de variaj humo kaj lumo.

Krom la gravaj membiografiaj verkoj jam menciitaj la libro enhavas elstarajn eseojn de Edwin pri la historio de Esperanto en Sud-Afriko kaj la evoluo de la originala literaturo de Esperanto sub egido de Stafeto, la eldonejo de Juan Régulo Perez (antaŭe aperigita en *Serta Gratulatoria in Honorem Juan Regulo*, 1987). Aparte menciinda estas la Antaŭparolo de Arno Kucharzik, amiko de Edwin ekde junulaj jaroj. Arno ankaŭ verkas unu el kvar artikoloj, kiuj aperas sub la titolo “Homoj kiuj multe rilatis kun mi persone”.

Edwin de Kock havas nun 78 jarojn. Kvankam li ja estadis membro de la Akademio de Esperanto (ĝis 1977) kaj restas honora membro de la Universala Esperanto-Asocio, li estas por ni, liaj legantoj, antaŭ ĉio poeto de neordinara integreco, poeto kies verkaro atestas neripozeman menson kaj kunsenteman naturon, kiuj daŭre reagigas lin al partopreno en la multvariaj kondiĉoj, kiujn prezentas la vivo. Tial ni danku al Edwin de Kock, kaj ne malpli al lia bona edzino, Ria, kiu tiel ame kaj fidele lin subtenis sur la vivovojo.

Baldur Ragnarsson

Vinjeto el *Vestnik Znanija*, 1908



Sur poeziaj padoj de Eli Urbanová

Urbanová, Eli. *Prefere ne tro rigardi retro*. — Dobřichovice: KAVAPECH, 2007. — 128 pĝ.

Poezio de Eli Urbanová ne postulas rekomendon. La aŭtorino, ĉeĥino, partoprenas en la esperanta kulturo de la 1950aj jaroj. Multfoje premiita, aperiginta poemojn en multaj revuoj, rimarkita de esploristoj pri literaturo ŝi publikigis sep originalajn poemvolumojn: *Nur tri kolorojn* (1960), *El subaj fontoj* (1981), *Verso kaj larĉo* (1986), *Vino, viroj kaj kanto* (1995), *Peza vino* (1996), *El mia buduaro* (2001) kaj *Rapide pasis la temp'* (2003). Kelkajn ŝiajn poemojn provizis per muziko komponistoj Bohdan Gselhofer, Otakar Maršík, Vlasta Šmejkalová kaj Rob Vetter. Ŝia aŭtobiografio *Hetajro danças* (1995) vekis grandajn emociojn en Esperantio kaj ne nur, pro la sincereco kaj senpruda traktado de la intima vivosfero. Dramaktorino Eva Seemanová prezentis ĉapitron el ĝi Esperante kaj ĉeĥe kiel monodramon.

Prefere ne tro rigardi retro estas aŭtora elekto el la sep jam publikigitaj poemaroj. Ĝi enhavas ankaŭ valoran, instruigan biografion, kiu ampleksas tutan, abundan, multdirektan kaj multjaran, esperantan agadon de la aŭtorino.

Legante ankoraŭfoje poemojn de Eli Urbanová oni antaŭ ĉio konstatas neeblecon forgesi pri la retrorigardado. Formo de ili ne strebas mirkonsterni per la avangardaj rimedoj. Ordigita laŭ la tradiciaj principoj vortmaterialo kun regulaj ritme-rimaj skemoj, lerte aplikataj, korespondas kun “eternaj” temoj de la prikonsideroj. En ĉiuj sep volumoj kaj multaj, apartaj versaĵoj Eli Urbanová verkas unu poemon pri vivo de la virino, pri sia vivo. Ŝi mem konfesas:

*Ne, mi ne havas multajn sciojn;
jen kion mi neglektis,
dum febre mi kolektis
impresojn, emociojn.
(Konfeso)*

Tiujn impresojn kaj emociojn povas liveri al la sentema observantino ĉiu, eĉ la plej simpla travivaĵo aŭ percepto — rigardado de la propra vizaĝo en spegulo, damo surstrate, kiu “laŭ la modo kombis al si noblan nodon” — (*Virino kun kofro*), komodo el erika ligno, “tableto, kies tri apogiloj infre aspektas, kvazaŭ piedoj de bestio...” (*El la antikva buduaro*), konduto de la hundoj, disfloritaj peonioj, detaloj de la vesto:

*Kian mi aĉetis tukon:
Verda estis ĝi kaj lila
kaj ol plumo pli facila,
nu, bela!
(Tuko)*

Sed la ĉefan lokon inter la emocioj okupas amo en ĉiuj aspektoj — de singardema penso pri danĝero kontaktiĝi kun viroj tra unuaj, malkuraĝaj sentoj, kresko de pasio, al kiu povas domaĝi nek homoj, nek dudekgrada frosto, tra malcerteco ĝin konservi per sukcesaj kaj malsukcesaj streboj, tra la prava supozo, ke ĝi jam foriras — ĝis la nobla rezigno ornamita per la belaj rememoroj.

*Saliko estas mi, saliko;
iom kaduka, iom verda,
jam rezignantanta, mi plu perdas
la foliaron ... Aĥ, amiko!
Rapide pasis temp' de rozoj.
(Saliko)*

Ĉio ĉi jam estis esprimita. Jes. Sed priskribante ĉiujn fazojn de la naskiĝanta, matura kaj foriranta sento — la poetino neniam enuigas la leganton. Gravan rolon dum priskribo de diversaj am-situacioj plenumas la memironio, ĉiam memoranta pri ĉiutageco kaj ne rare pri fiziologio:

*Ke ni nin amas, estis klare
sen ia ajn debato ...
Kaj tamen se mi ne demetus
la robon el brokato,
li eble ĝis hodiaŭ sidus
en jako kaj kravato ...
("Virato")*

*Li la ĉemizon al mi kuspis ...
Pri sia amo al mi flustris ...
[...]
Li tiel avida min kisi.
Li iris for sole por pisi ...
(Lasta amanto)*

Ne mankas en poezio de Urbanová momentoj, de kiuj plenplene estus kontentaj feministinoj. Forte substrekata rajto de virino al la sendependeco estas esprimita ne per agreso aŭ senkonsila ĝemo sed per subtila ironio, kiu agas pli forte:

*Laŭ mia edz',
al kiu multajn dankojn,
de la gepatroj
heredis mi nur mankojn.
(Laŭ mia edz')*

*Nenio lia ŝin ekscitas
<...>
nek buŝo, ĉiam predikpreta.
Kondut' entute tro kvietaj
<...>*

*Malvarma kiel mem marmoro
glitadas ŝi el vestkiraso ...
<...>
dum ama akto sen ekstazo,
en ŝi eksplodas muta ploro.
(Frigida edzino)*

Ĝue oni povas renkonti en tiuj versaĵoj motivojn el la popola kulturo, kiel en poemeto *Rozo*, kiu ekfloris ĵus pro penso pri la elektita amanto, aŭ pli minace, trans trarigardo de la popolaj konvinkoj kun speciale akcentita, forta seksardo direktita al satano — ĝis la morto sur ŝtiparo, en poemeto *Sorĉistino*. Plaĉas ankaŭ libera uzo de la antikvaj elementoj en belegaj verkoj *Antaŭ spegulo kaj Renkontiĝo*.

Eli Urbanová ne estas indiferenta pri sociaj problemoj. Konvinkon, ke oni devas labori por la tuta homaro, pro gravaj kaj malpli gravaj malfeliĉoj de unuopaj homoj ŝi prezentas en *Homoj kaj Ĝusta vojo*. La plej esenca nepro preskaŭ neeblo por ĝin atingi estas memkompreneble la paco:

*min kostis nur tro multe da medito,
ĉu vere eblas mondo sen milito
(Ĝusta vojo)*

Poemoj *Kaj eksonoros sonoriloj* kaj *Tosto al Eŭropo* estas viziaj revoj pri la tempo, en kiu universale ekregos la justa kaj stabila paco,

*kaj vero estos parolata
kaj ne mensogo diplomata*

*Kaj eksonoros sonoriloj
kaj feste portos sin tra l' spaco:
Mir! Béke! Frieden! Pokój! Paco!*

Verkanta vera esperantistino esprimas ankaŭ sian opinion pri la internacia lingvo Esperanto, favoran, diskutantan kontraŭ cirkulantaj, konataj de ni ĉiuj pritaksoj:

*Ja kia forto! Kia vivo!
Kaj iu diras: Lingvo arta.
Verko kreita por arkivo.
Ne estas vero. Eĉ ne parta.*

Ĉi lingvo defendos sin tutcerte pro sia flueco kaj bela melodio.

Pro la menciitaj kaŭzoj kaj pro la propraj ni legu la poezion de Eli Urbanová. Ni trinku kune kun ŝi la pezan vinon de la vivo brave kontraŭstarante al obstakloj de ekzisto kaj de amo. Ni, kiel ŝi, kolektu la travivaĵojn — tiujn pro kornikoj sur la vintra arbo kaj tiujn pro la apetitiveka vira korpo en alkovo. La esperanta mondo sen ŝia poezio estus nekompareble pli malriĉa.

Lidia Ligeza

Songoj en labirintoj

Borges, Jorge Luis. *La sekreta miraklo: Prozo kaj poezio / Kompilis István Ertl. Tradukis el la hispana Jorge Camacho, Giulio Cappa, Tomasz Chmielik, Fernando de Diego, Liven Dek, István Ertl, Higinio García, Kris Long, Gonçalo Neves, Joxemari Sarasua, Francisco Veuthey; Antaŭparolo de Jorge Camacho; Notoj de István Ertl, Aleksander Korjenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2008. — 200 paĝoj. — (Serio Mondliteraturo; Volumo 16).*

De tempo al tempo mi pensis ke, se mi rikordus songojn ĉiutagajn kaj ĉiunoktajn, — jes ja, tagnokte mi songas plurfoje songojn dorme aŭ kun la okuloj ovraj, kuŝe aŭ side aŭ irante, endome aŭ ekstere... — kia libro estus. Ĉi-momente, leginte la libron *La sekreta miraklo* de Jorge Luis Borges (1899–1986), mi sciis kia libro estos, kvankam la rikordo en mia imago neniam ekverkigis. Ĝuste ĝi similos tiun de Borges. Sed ankoraŭ ne klaras, jam ne, la lia similus al la mia, aŭ la mia similus al la lia. Se al mi ne venus la libro en Esperanto por recenzi, eble mi neniam konus la sekreto de Borges, kaj mia songo-libro aperus sen suspekto imiti la lian. Komprenoble, oni certe dubos, ke mia stilo estas borgeseska, imita, ĉar Borges aperas en Ĉinio ekde la jaro 1979. Por sincere diri, antaŭe Borges spite restis neniu al mi, tute ekster mia scio kaj songo. Ĉiel nun mi forlasas la planon verki songo-libron propran, ĉar defii la mastron Borges intence aŭ senkonscie estos por mi fiasko.

Erudicia kiel enciklopedio estas Borges en lingvoj, literaturo, historio. Ni vidas ke en *La sekreta miraklo* kun 31 prozoj kaj 14 poemoj troviĝas multe da personaj nomoj rilate al kulturo, literaturo kaj historio, kaj multe da pecoj aŭ frazoj cititaj el libroj aŭ gazetoj. Ne nur okcidentaj sed ankaŭ orientaj, aparte ĉinaj. Por ordinara homo kiel mi, malfacile ja estas kompreni liajn artikolojn, eĉ nur scii, al kiaj ĝenroj apartenas la verkoj legataj. Ĉe li novelo estas eseeca, eseo recenzeca, recenzo noveleca, ktp, ktp. Por perfekte kapti la enhavon kaj signifon, necesas plie ke, post ĉiu prozo aŭ ĉiu poemo aldoniĝu priaj fonoj kaj eksplikoj. Bedaŭrinde tamen, se tion oni farus, probable la miraklo de Borges perdiĝus.

Relative neriĉaj aspektas bildoj kiuj hantas la prozaĵojn kaj poemojn. Re kaj ree aperas spegulo, labirinto, libro kaj



abstraktaj tempo kaj songo. Cikloco estas unu el la plej elstaraj karakteroj de la verkaro de Borges. Ciklaj estas ne nur bildoj, sed ankaŭ temoj tuŝitaj kaj strukturoj priskribitaj. Nu, recenzistoj prenas tipaj la du — *La biblioteko de Babelo* kaj *La ĝardeno de la disdubiĝaj padoj*. En ili samtempe al legantoj montriĝas ke ciklaj formoj de konstruoj, pozicioj de objektoj, agoj de personoj... ĉio sentiĝas en labirintoj infinitaj, imbrikitaj kaj interkruĉitaj.

Fakte, nia vivo mem ĉiam iras kiel en labirintoj kaj songoj. *La Sudo, La vualitaj speguloj, Borges kaj mi...* pritemas songojn, songojn cis kaj trans speguloj. Sendube, logikoj ofte mankas al songoj. Songoj konsistas el salato de ideo, idealo, realo, revo, vero, veo, ero, reo ktp. Efektive oni ne devas distingi songojn de halucinoj. Kaj per logiko kaj senlogiko, ankaŭ ne tiele juĝeblaj estas kondutoj de homoj. Borges estas mi; mi estas Borges. La tuta mondo estas libro sen aŭtoro, sen kopirajto de aŭtoro kaj eldonejo. La komenco ligiĝas kun la fino; ĝin verkas spuroj sur la tero kaj en la cerbo, kiel la universon kaj tempon sen dimensio kaj mezuro. Ni kuras sur rondo eta sed ne povas trovi komencon kaj finon; aŭtoro kreas rolulojn kaj la roluloj faras la aŭtoron. La centra punkto estas destino kiu devigas nin agi ĉirkaŭ ĝi subkonscie. Ni vivas kaj ni devas vivi kaj ni ne povas ne tiel vivi — nur ĉar la songo regas.

Simile kun la supre menciitaj ecoj estas poemoj de Borges. Ĉene cikla vidiĝas *Arto poezia*, kaj en la formo kaj en la enhavo. Kaj en *Pluvo* troviĝas nekapteco de tempo kaj spaco: ...*Falas aŭ falis...* / ... / ...*sarmento korta / en korto jam ne plua.*

Ne miskomprenu, mi petas. Borges ne estas homo kiu somnambas diurne, kvankam li suferis je blindeco ekde la jaro 1950 post vidmalsano 30-jara. Liaj verkoj tute ne pruvigas sensalaj kaj senfilozofiaj. *Pri la klasikaĵoj, La du reĝoj kaj la du labirintoj, Argumentum ornithologicum, ako...* povas prenati kiel ekzemploj salhavaj aŭ filozofiozaj. Kia-grade la vida malsano influis liajn penetron kaj imagivon, ni ne scias. Verŝajne li rigardis aferojn pli akre ol ni kun la klaraj okuloj. Jes, li spektis scenojn per la koro kaj cerbo, sensante intencion, antecon kaj ontecon, eĉ ion ne atribuitan al inteco, anteco kaj onteco.

En *Pri la klasikaĵoj* legeblas la peco: “Klasika (mi ripetas) ne estas libro, kiu nepre posedas iajn aŭ aliajn meritojn; tia estas libro, kiun la homaj generacioj, urĝitaj de diversaj kialoj, legadas kun anticipa fervoro kaj kun mistera lojaleco.” Ĉu klasika aŭ ne estas la borgesas, legantoj mem konceptu.

Admirinda estas la kunlaboro de la tradukintoj. Traktante intertempe la anglan, la francan, la germanan, la latinan, ili elhispanigis flue la miraklon de Borges. Danke al ilia penado aldoni la klarigojn sufiĉajn en la piednotoj, legantoj ĝuas la verkaron sen timo sidanta sur la lingva babelo. Kaj en la malantaŭa parto de la libro troviĝas notoj pri nomoj kaj frazoj laŭ apervico en artikoloj respektivaj. Riĉaj, eĉ kontentigaj al studemaj ekspertoj. La impona alteco de esperanta nivelo de la tradukintoj estas jam aksioma kaj tion oni konsentas for de kajola kulto. Parenteze, menciinde estas, ke plejparto de ili ŝatas neologismojn. “Nelge” kaj similaj eble ne plu estas konsiderataj ĉe legemuloj neologismoj; “lo”, “ĉendi”, “eksklami” kaj aliaj dekkelkaj ĉefe el *Neologisma Glosaro* listiĝis en la glosio fine de la libro.

Krome, pri pluraj ĉinaj nomoj, aparte en *La ĝardeno de la disdubiĝaj padoj*, “Ju Cun”, “Tsingtao”, “Ts’ui Pen”, “Hung Lu Meng”... verŝajne en “The Wade System”, la tradukinto ne uzis nuntempe la oficialan sistemon Pinyin (Hanlingva Fonetiko). Sekve de tio, legantoj en la ĉefkontinento ekster Tajvano, Aomen kaj Hongkongo sentas iom da strango. “The Wade System” restas ekster mia scio.

Mao Zifu

**Ne forgesu
(re)aboni**



Blue Penguin

La voĉensemblo *Blue Penguin* el Bologna en Italio eldonis Esperantan diskon en aŭgusto 2007. Sed la disko aperis tro malfrue por la Universala Kongreso de Florenco. Ili maltrafis ĝin!

Tiu speciala disko prezentas akapelan (nur voĉan) modernan version de la Esperantista Himno de Ludoviko Zamenhof ... mikso de klasika, ĵaza kaj novaĝa muzikoj.

Por realigi *La Esperon*, la ĥorestro Andrea Rizzi aranĝis harmonizadon pli modernan kaj ampleksigis la Esperanto-himnon kvazaŭ etan simfonion. La gekantistoj de la voĉensemblo lernis la Esperanto-tekston kaj la italan tradukon. Esperantista amiko de la ensemblo asistis la gekantistojn por ĝusta prononcado de la teksto, kiun ili kantis papage. La rezulto sonas tute perfekte.

La surkovrila desegno de velŝipo reprezentas la Esperantujon de paco kaj kompreneble la koloro de la desegno estas verda: simbolo por la ensemblo de paco kaj ankaŭ de la Esperanto-movado.

Blue Penguin estis inspirita por krei tiun originalan verkon ĉar ili havas Esperanto-amikojn, kaj ĉar ili ŝatas defiojn serĉante novajn ideojn por novaj muzikaj spertoj.

La grupo naskiĝis en Bolonjo en 1998 kaj konsistas el naŭ voĉoj, kun ampleksa repertuaro irante de duŝopo (doo wop) ĝis pop-roko, de diskoo de la 1970aj jaroj ĝis latinamerikaj ritmoj,



kun eta halto, nur la daŭro por langoklako, en la itala muziko de la 1930aj jaroj.

Blue Penguin kantas sen helpo de instrumenta bazo. Ili reproduktas nur per voĉoj la tipajn sonojn de muzikaj instrumentoj.

La stilo de *Blue Penguin* estas influita de la anglamerika akapela sono (ekzemple: *Swingle Singers*, *Real Group*, *M-PACT*, *Rockappella*). La harmonizado plej parte originala estas verkita de Andrea Rizzi, ankaŭ kreinto de *Blue Penguin*.

Akiri la diskon eblas rete ĉe la vendejo www.preludiomusic.com aŭ rekte skribante al bluepenguin@infinito.it aŭ ankaŭ tra iliaj retpaĝoj <http://www.bluepenguin.it> kaj <http://www.myspace.com/pengeris>

Flo!

Taon ne plu inter ni...



Taon (Ono Takao) forpasis sabate la 11an de oktobro 2008 en Jokohamo.

Li naskiĝis en Jokohamo la 9an de majo 1961. Li estis muzike tre aktiva en la bando *La Mevo*. Kiam kreiĝis EUROKKA li tuj ekkunlaboris kaj subtenis ĝian muzikan agadon relaksante ĝin en Japanio. Kiam EUROKKA starigis la eldonejon *Vinilkosmo*, same efike li agis.

Kaj krom siaj propraj albumoj li alportis gravan kaj originalan kontribuon al la projekto *Vinilkosmo-Kompil'*. Sojle de la jaro 2000 li kreis la unuan retejon de EUROKKA/Vinilkosmo, kiu ankoraŭ ekzistas.

La Mevo naskiĝis en 1986 iom antaŭ la Centjara Jubileo de Esperanto, kiam renkontiĝis Saeki Hirojuki kaj Ono Takao. Post la eldono de la unua kasedo *La Nomkarto* (1987) Hirojuki elbandiĝis.

Micujama Joŝiro enbandiĝis kaj partoprenis la duan kasedon *Bluo* (1991).

La Mevo produktis sian trian albumon *Vizaĝoj* en 1993. En ĝi Taon estis sola: li verkis la tekstojn, komponis la muzikon, kaj kantis.

Sian lastan kanton *Flava Brankul'* li komponis kaj registris en 1995 por la unua volumo de *Vinilkosmo-Kompil'*.

Por ke oni malkovru lian kompletan verkaron, laŭ mia instigo li finfine eldonis en 2003 la *Kompilaĵon* en limigita kvanto (bedaŭrinde, jam elĉerpita), kiu kunigis la tri albumojn kaj ankaŭ novan version de *Flava Brankul'*.

Profesie Taon estis komputilisto, kaj pro granda investo en tiu laboro li post 1995 flanken lasis la muzikan kreadon. Tamen li aktivis en la Jokohama Esperanto-Rondo ĝis la lasta momento. Taon estis unu el la du motoroj por la projekto starigi elektronikan esperanto-japanan vortoliston al ĉiu kapvorto de PIV.

Stomaka karcero forrabis lin, kiam li estis nur 47-jara...

La muziko de *La Mevo* estas simpla, kun facilaj popritmoj, precipe realigita per komputile mastrumataj sinteziloj, miksitaj kun kordinstrumentoj kaj sekvenciloj.

La retejo de *La Mevo* ankoraŭ estas aktiva ĉe: www.s-w.co.jp/~taon/lamevo/lamevo.html

Eblas trovi lin en lia ankoraŭ aktiva paĝo: <http://www.s-w.co.jp/~taon/> Ĉe *MusicExpress* aŭskulteblas kelkaj eroj el la *Kompilaĵo*:

<http://www.musicexpress.com.br/artista.asp?Artista=280>

Kiel vi povis konstati Taon estis sindonema homo laŭ longe de sia kurta vivo. Li estis tre modesta kaj tre diskreta pri sia privata vivo, tial lia forpaso estis por ni ĉiuj tute neatendita...

Taon, por ĉiam vi enskribiĝis en la Esperanto-kulturo pere de viaj muzikverkoj kaj tiamaniere vi restos proksime al niaj koroj.

Adiaŭ, amiko!

Flo!



La tria “Spegulo” aperis

Ankaŭ en la aŭtuna numero de *Spegulo* respeguliĝas la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-ĵurnalistoj ne nur per la redaktora enkonduko de Stanisław Śmigielski, sed ĉefe per publikigo de la kongresa prelego de Kalle Kniivilä. En sia *Konformismo en la Esperanta gazetaro* li komparas nian verdan gazetaron kun la funkciado de partia gazetaro en unupartia, totalisma ŝtato, substrekante bezonon de libera kaj multflanka raportado pri okazaĵoj en la Esperanta mondo.

Svisa slavisto Andreas Künzli intervjuas Kolker kaj Gončarov, iamajn ĉeffiguojn en la Sovetia Esperanta Junulara Movado en la 1960–70aj jaroj, kiuj eldiras sian vidon de la Esperanto-movado en Sovetunio ankaŭ en la posta oficiala periodo.

La plej grava ruslanda disidentulo Aleksandr Soljenicin estas omaĝita per biografia artikolo de Künzli kaj fragmento el lia romano *Arkipelago GULag* en la traduko de Tomasz Chmielik. La sama tradukanto prezentas prelegotekston *La problemoj de malbono en la postmilita Eŭropo* de usonano Tony Judt.

Kroata ĵurnalistino Slavenka Drakulić, dediĉinta sian akran plumon al militaj krimuloj juĝataj de tribunalo en Hago, eseeas en *Doktoro Poeto kaj Sinjoro Krimulo* pri Radovan Karadžić (trad. T. Chmielik).

Tomasz S. Chmielik (la filo) finas sian prikinortan serion per *Kieślowski: Tri koloroj — Ruĝa*.

Finas la revuon la dankvortoj de Andreas Künzli pro la aljuĝita premio de la Fondaĵo Antoni Grabowski.

Legis por vi
Halina Gorecka

Ricevitaj libroj

Borges, Jorge Luis. *La sekreta miraklo*: Prozo kaj poezio / Kompilis István Ertl. Tradukis el la hispana Jorge Camacho, Giulio Cappa, Tomasz Chmielik, Fernando de Diego, Liven Dek, István Ertl, Higinio García, Kris Long, Gonçalo Neves, Joxemari Sarasua, Francisco Veuthey; Antaŭparolo de Jorge Camacho; Notoj de István Ertl, Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2008. — 200 pĝ.; 400 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; №16). — [Donaco de *Sezonoj*].

de Kock, Edwin. *Sub fremdaj ĉieloj* / Antaŭparolo de Arno Kucharzik. — Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2007. — 286 pĝ. — (Serio *Stafeto*; №32). — [Recenzoekzemplero].

Jarlibro de Rusia Esperantista Unio 2007. — M.: REU, 2007. — 32 pĝ., il. — [Aĉeto].

Melnikov, Aleksandr. *Esperanto — lingvo de kulturo kaj personeco*. — M.: EJU Justo, 2007. — 96 pĝ.; 200 ekz. — [Aĉeto].

Urbanová, Eli. *Prefere ne tro rigardi retro*. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2007. — 128 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Григорьев, Виктор Петрович. *Из прошлого лингвистической поэтики и интерлингвистики*. Изд. 2-е, доп. — М.: Едиториал УРСС, 2004. — 192 с.; 500 экз. — [Aĉeto].

Kolker, Boris Grigorjevich. *Международный язык эсперанто*: Полный учебник = *Internacia lingvo Esperanto*: Plena lernolibro. — М.: Импэто, 2007. — 264 с.; 1000 экз. — [Aĉeto].

Ricevitaj gazetoj

Bonhumora Zamenhofano. 2008/0; EAB Update. 2008/43; Esperanta Finnlando. 2008/4; Esperanto. 2008/9; Espero.com. 2008/[1]; Femina. 2008/15; Frateco. 2008/81; FREŜO. 2008/45; Heroldo de Esperanto. 2008/10,11,12; Informa Bulteno. 2008/3; Informoj de EAE. 2008/3; Internaciisto. 2008/3; Juna Amiko. 2008/2; KAE-Infomilo. 2008/64; Kataluna Esperantisto. 2008/346; La Brita Esperantisto. 2008/965; La KancerKliniko. 2008/127; La Movado. 2008/691; La Ondo de Esperanto. 2008/10; La Revuo Orienta. 2008/8-9; La Sago. 2008/46; Literatura Foiro. 2008/234; Litova Stelo. 2008/4; Monato. 2008/10; Norvega Esperantisto. 2008/4; Pola Esperantisto. 2008/4; Sennaciulo. 2008/7-8; Spegulo. 2008/3; Svisa Esperanto-Societo Informas. 2008/3; Verda Lumo. 2008/9; Verdaĵo Saksofono kaj Triskelo. 2008/4.

Gazetoj

Literatura Foiro. 2008, №234

Diversaj aktivecoj kaj internaciaj renkontoj karakterizas la verkistan komunumon, al kiu la Esperanta PEN apartenas.

La revuo *Literatura Foiro* prezentas en ekskluziveco la kontribuojn de la esperanto-verkistoj en tiu kadro: en la aŭgusta numero 234 temas pri la teksto de la rezolucio de Stokholmo kaj pri la festparolado de la portugallingva verkisto Mia Couto, tradukita de Bertil Nilsson, okaze de la mondkongreso de la beletraj tradukistoj, fine de junio 2008.

Inter la pliaj membroj de la Esperanta PEN, Vinko Ošlak proponas premiere sian lastan filozofian verkon, ankoraŭ en manuskripto, kaj Giorgio Silfer sian festparoladon pri Amikejo, la projekto de ŝtato kies oficiala lingvo estus esperanto, en la Neŭtrala Moresneto.

La teksto de c-ano Ošlak pritraktas la rolon de la lingva identeco en la Biblio, kun diversaj novaj ideoj, kelkfoje tre interesaj.

La parolado de c-ano Silfer, prezentita en Bruselo ĉe la Domo de la Verkistoj (Muzeo Camille Lemonnier) fine de julio 2008, konsideras ankaŭ la 60an datrevenon de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj kaj la 10an datrevenon de la Pakto por la Esperanta Civito: temas pri strategia linio por la esperantlingva intelektularo.

Kaj krome: Nicolino Rossi finas sian eseon pri la poezio de Francesco Petrarca, Ken Miner proponas poemon sian kaj Mikaelo Bronŝtejn sian lastan romanon.

La revuon *Literatura Foiro* posedas, eldonas kaj administras LF-koop. Ĝia ĉefredaktoro estas Ljubomir Trifončovski.

HeKo

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la tasko *Nur radikoj* venis nur sep respondoj, krom unu, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Erkki Kemppainen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Dorota Burchardt (Pollando), Klara Iljutoviĉ (Ruslando). La loto donis libropremion al **Erkki Kemppainen**. Ni gratulas!

La ĝustaj respondoj: *Horizontale:* 1. peruk'; 3. sprot'; 5. ion'; 6. kolum'; 8. goril'; 10. pingl'; 12. idiot'; 14. ark'; 15. latun'; 16. datum'. *Vertikale:* 1. penik'; 2. kutim'; 3. spong'; 4. tabul'; 7. ung'; 9. ord'; 10. petal'; 11. latin'; 12. iksod'; 13. totem'.

Komuna nomo

Enskribu vertikale vortojn kaj en la kadrita linio vi trovos vorton por komune nomi ilin. Kiel solvon sendu ĉi vorton al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ 10 dec 2008.

1. Honorofic'; 2. Segilfiŝo; 3. Tetra'; 4. Plenkreska; 5. Supra sojlo'; 6. Malliberej'; 7. Saliko; 8. Monaĥej'; 9. Pindo.

Kompilis **Jurij Kivajev**

1	2	3	4	5	6	7	8	9

Judaj historietoj

Konsilo de rabeno

Geedzoj venas al la rabeno:

— Nia geedza vivo malsukcesis kaj ni ambaŭ deziras eksedziĝi. Sed ekzistas problemoj: ni havas nur unu infanon, kaj ni ne sukcesas decidi, kiu el ni eduku lin.

— Iru hejmen kaj revenu post jaro, — la rabeno respondis. — Tiam vi havos plian infanon kaj vi dividus la du infanojn inter vi.

La paro obeis kaj hejmeniris. Post unu jaro ili revenis al la rabeno, tute malĝojaj:

— Rabeno, naskiĝis al ni ĝemeloj...

El la kolekto de **Josef Shemer**



Vido de Oostmolenwerf 25-07-08

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Ne pri ĉio, aŭ: La limoj de prezidanto

... ne pri ĉio mi havas ion utilan por diri ĉi-momente. (Probal Dasgupta, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/11912>, 13 okt 2008)

For el izoleco! aŭ: La limoj de prezidinto

Mi neniam rezignis pri tio, ke oni devas disvastiĝi Esperanton al ĉiuj, por ke ĝi iĝu ĉies dua lingvo, lingvo por intergetaj rilatoj... (Renato Corsetti, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/11881>, 12 okt 2008)

Malplena stoko en Bjalistoko

Al UK-2009 aliĝis 0 personoj el 0 landoj (http://www.uea.org/kongresoj/uk_2009.html, stato la 21-an de sep 2008)

Komento ankaŭ ne ĉi-rubrike

Tiu ĉi komenton ne publikigis *La Ondo* pro la frazo "la enviajn kretenaĵojn de Silber", kiun la revuo volis forcenzuri. (Jorge Camacho, <http://jorgecice.blogspot.com/2008/08/la-lingvo-serena-kaj-la-cerbo-hermeta.html>, 7 aŭg 2008)

La malskandema apostrofobiulo

John Wells ... ĵus proponis forigi la regulojn de "spelling", la skandado de la angla lingvo ... Li ankaŭ proponis forigi la apostrofon de la saksa genitivo. (John Wells proponas reformi la anglan // HeKo 368 5-A, 16 sep 2008, <http://www.esperantio.net/index.php?id=667>)

Fekegale

John Wells ... proponis la modernigon aŭ relaxigon de la angla ortografio. (Tonyo del Barrio, <http://groups.yahoo.com/group/reago/message/7939>, 9 sep 2008; rimarkis Kalle Kniivilä)

Amiko el Afriko, trezoro por IJK

La 63a Internacia Junulara Kongresejo pasintjare en la vietnama ĉefurbo Hanojo estis riĉigita per partopreno mia. (Adjevi Adje // *KomACE*, 2008, №34)

La postkorto, aŭ: Vandaloj ĉe la pordo

...en Parizo... En la postkorta [SAT-]sidejo de avenuo Gambetta verŝajne ne restos plu la kontoro, sed nur deponejo... Bedaŭrinda vandalismo (la forigo de la asocia ŝildo el la ĉefa pordego) fatale aŭguras la novan epokon. (La Konsulo renkontis la Sekretarion de SAT // HeKo 369 1-C, 30 sep 2008, <http://www.esperantio.net/index.php?id=672>)

Altaj postenoj en perspektivo

... selektaj testaroj koncernos unuavice la kandidatojn al postenoj de aktisto aŭ buralisto kadre de la Esperanta Civito (Plia agnosko sine de ALTE // HeKo 368 7-C, 25 sep 2008, <http://www.esperantio.net/index.php?id=669>).

La maldekstra bildo estas unu el tiuj, kiujn Lilli Giloteaux faris en Roterdamo dum la 93a UK.



Dankon!

Estis granda surprizo por mi trovi mian nomon inter la laŭreatoj de la premio de la soci-kultura revuo *Spegulo*. Surprizo, ĉar mian agadon mi neniam supertaksis kaj konsideris ĝin io tute ordinara, tio, kion faras tre multaj, iuj eventuale pli bone kaj pli lerte. Preskaŭ tri jardekojn mi estas ĉe la flanko de mia amiko kaj edzo, Aleksander Korĵenkov, kaj ĉio farita kaj atingita okazis danke al liaj kuraĝigo kaj subteno. Des pli, ke apud tia persono ne eblas resti apatia stagnulo. Li eĉ cedis antaŭ multaj sociaj kaj organizaj aktivecoj miaj, kiuj foje damaĝis nian komunan laboron, ĉar li komprenas, ke sen tio mi velkos. Mi dankas lian toleremon.

Sed ja pli forta estas la honorsento pro la premio, kies unuaj laŭreatoj prezentas tiom respektindan societeton. Mi estas feliĉa, ke amikeco kaj kunlaboro ligas min kun du el la aliaj laŭreatoj, Paweł Janowczik kaj Povilas Jegorovas — du Paŭloj, kies personajn kvalitojn, grandanimecon kaj sindediĉon al nia verda afero mi alte aprezas.

Mi kore dankas la redakcion de *Spegulo* pro la aljuĝita premio kaj simpatia statueto, kiu nun bele ornamas nian laborĉambron.

Halina Gorecka

Anonctabulo

La advokato Victor Zammit estas entuziasma spiritisto, defendanto de la kredo ke vivo pludaŭras post morto. Li partoprenas seancojn kaj verkis interesan libron *A Lawyer Presents the Case for the Afterlife: Irrefutable Objective Evidence*.

En sia retpaĝo li petas, ke ĉiuj interesataj pri la temo traduku lian libron (senpage disponebla ankaŭ en diversaj lingvoj) al siaj denaskaj lingvoj. La originalo estas en la angla, sed tradukoj ankaŭ estas en la franca, rusa, portugala, hispana, germana, ktp.

Eble iu tradukema esperantisto povas traduki la volumon al la Internacia Lingvo.

La retpaĝo de Victor Zammit kaj de la libro estas: <http://www.victorzammit.com/index.html>

Wendel Teles Pontes (Brazilo)

Eldona Societo *Esperanto* planas eldoni novelaron kun noveloj verkitaj en 2000–2009. Ni invitas ĉiujn verkemulojn sendi novelojn prefere retpoŝte al esperanto@globalnet.net aŭ papere al Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11, SE-961 76 Boden, Svedio. Ni ne resendas manuskriptojn.

Limdato: la 1a de Aprilo 2009.

Leif Nordenstorm (Svedio)

Pagante vian kotizon por la sekva jaro bonvolu ne forgesi pri neriĉaj samideanoj, kiuj volas sed ne povas legi "La Ondon". Helpu ilin per nia abonhelpa fondaĵo.



Finlando Fransuaz Rochette el Francio havis varmetosan koncerton en Turku 10 sep 2008. Poste ŝi daŭrigis sian turneon al Laitila, Rauma, Pori, Tampere, Iisalmi kaj Heinola. Kompreneble, ŝi admiris la novan ĉefbibliotekon de Turku, kie *La Ondo* estas je dispono de legemuloj. (Jorma Ahomäki)



Koreio 22–24 aŭg Korea Esperanto-Junularo okazigis Junularan Someran Esperanto-Kurskunvenon en bela marbordo de Deĉeon. Ĝi estis utila okazo por junuloj lerni ne nur pri la lingvo mem, sed ankaŭ pri la movado, kulturo kaj historio, kiujn faras la komunumo de esperantistoj. (Song Ho-young)



Ĉinio 6 sep komenciĝis du novaj kursoj de Esperanto por komencantoj kaj por progresantoj en la sidejo de la Esperanto-asocio de Kantono sub la gvido de Augusto Casquero (Hispanio). Oni klopodas prepari homojn por la UK en Bjalistoko, malgraŭ la timo pri vizoproblemoj. (Augusto Casquero)



JORGE LUIS BORGES
La sekreta miraklo


Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*
Serio Mondliteraturo, Volumo 16
200 paĝoj, 18 eŭroj



Jules Verne


Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj

Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*
Serio Mondliteraturo, Volumo 15
208 paĝoj, 20 eŭroj



J.R.R. Tolkien
LA HOBITO
aŭ
tien kaj reen

J.R.R. Tolkien. *La hobito, aŭ tien kaj reen*
Serio Mondliteraturo, Volumo 9
224 paĝoj, 18 eŭroj



Georges Simenon
La flava hundo

Georges Simenon. *La flava hundo*.
Serio Mondliteraturo, Volumo 14
120 paĝoj, 12 eŭroj.